

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto



Oktobro
2007

№10

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2007. №10 (156)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloísio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2008

Internacia tarifo: 32 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 18 eŭroj

Ruslanda tarifo: 390 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la paĝo 23 de la februara kajero.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 700 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (2000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1200 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (700 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (400 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2007.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2007, №10 (156).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто. Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 17 сентября 2007 г.

Цена свободная. Тираж: 700 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

— Kiu ne estis anarĥiisto, al tiu mankas koro, kiu ne iĝis monarĥiisto, al tiu mankas cerbo, — foje iu diris sentence, sed, laŭ mia gusto, tro kategorie. Mi eligis tiun maksimumon de la memoro ne pro kelkaj aludoj politikaj pri ebla restaŭro de la monarĥio en Ruslando. Ĝi resonis en la kapo, kiam mi pensis pri mia interna drivo koncerne la nocion de la libero. Tiu ĉiam kara al mi vorto, iam fiera, plenpotenca kaj memsufiĉa, fariĝis dum la jaroj pli kaj pli relativa en mia konsidero; ĉirkaŭplektita per miloj da kordoj de kondiĉoj, ĝi iĝis fine modesta parto de certa sistemo de konceptoj, preskaŭ nesentebla mem de post la aglomeroj de aldonaj sencoj. Cetere, mi ne iĝis monarĥiisto, precipe se preni la aferon ne en dekora, ceremonia konsidero. Simple, nek koro, nek cerbo nun kapablas remalkovri la karan figuron en ĝia nudo, — nevidebla, ĝi staras kiel konturo de vako, permeso senpromesa.

Oni ja komprenas, kiun spiritan kaj animan dezerton generas la aŭtokratio, sed antaŭ kelka tempo oni komencis timi la venontan aŭtokration de la spirita kaj anima dezerto. Oni povus rememori la emancipitajn civitanojn de fiera Romo. Hedonismo triumfinta bizare deformis ilian liberon en plej brutan sklavismon.

Mil negativaj kaŭzoj revenigas min al la eterna temo: naneco de la dominanta kultura standardo, sociaj kaj politikaj marasmoj ĉiam kreskaj, etika debiliĝo pseŭdoemancipa. Sed la lasta kaj plej forta kaŭzo estas pozitiva. Ĝi sin kaŝas sub la ruĝa kovrilo de dika libro, kiun mi havas de antaŭnelonge sur mia librobreto. La planlingva svisa enciklopedio de Andreas Künzli rivelas strangan kvazaŭ kontraŭfizikan fenomenon: **iu parto aperas pli granda ol la tuto**. La enciklopedio donas la impreson de potenca vivo kultura, en la plejvasta senco de tiu vorto; kio evidente kontrastas kun la modesta vegetado teritorie de la granda Esperantujo. Kaj eĉ: la libro demonstras la nemalaltiĝon de la kultura nivelo del kulturproduktoj del estonteco. Oni ne povas supozi iluzion, optikan trukon, aferon de selekto — la kultura produkto (diference de tiu de komerco) ne estas fals-ebila.

Unu klara fenomeno malkovras la sekreton — **diluo erodas la materion de starigo**. La diluo ŝiras ligojn, ruinigas pontojn, rompas konektojn; ĝi rarigas la aeron per kiu oni spiras, eliminas la oksigenon, kiu movas, ĝi disigas la energion — kaj oni vidas kion oni vidas: en libro, revuo, poemo, debato... Unu krepuska vegeta rezervejo nomita Esperantujo.

Sendube, eblas multaj aliaj impresantaj kondensajfoj laŭ la tipo de la svisa: la franca, pola, jugoslava, skandinava... Kaj povas esti ke ekzistos unu sola rimedo savi, postvivigi kaj plifortigi la aferon — tiu de kondensado.

Revenante al niaj karaj nocioj ni vidu tiujn du fizikajn substratojn de negativa kaj pozitiva libero: inter **diluo** kaj **kondensado** kuŝas la intervalo en kiu permeso iĝas promesa.

Alen Kris

Sur la kovrilpaĝo estas gejunuloj el Ĉeĥio, Hungario, Italio, Francio, Finnlando, Nederlando dum ekskurso al la monto Johano-Paŭlo la Dua en la 18a Ekumena Esperanto-Kongreso. (*Fotis Salomé Hug por Kristana.org*)



Facileco kaj amikeco

La prezidanto de UEA komentas

La artikolo *Nerezignebla renovigo* de Giorgio Bronzetti en la septembra *Ondo* kaŭzis kelkajn interesajn reagojn, kiujn vi povas legi ĉi-kajere. La temo ne estas fermita. Pliaj (re)komentoj pri la strategio de la plej granda esperantista mondorganizo estas bonvenaj.

Skribante en *La Ondo de Esperanto*, Giorgio Bronzetti instigis nin en UEA eviti la predikemon kaj plitaŭgiĝi al niaj medioj. La predikemon pri la “lingvo de paco” li trovas aparte oscediga, ĉar malkonkreta. Ni konkretigu la ideon “lingvo de amikeco” per fakta strebado por atingi personojn, kiuj bezonegas la tuŝon de amikaj manoj. Pensu pri maljunuloj en epoko de efika medicino kaj longaj vivdaŭroj. Ilian solecan vivon povas lumigi ies helpema kaj agrabla kunesto. Ligu nian lingvon al tia konkreta amikeco, kaj intereso la homojn.

Por esprimi dankon al Bronzetti, mi ĉerpas el tiu atentigo du lernaĵojn. Unue, ne restu ĉe la facilaj amikecoj, sed volonte trovu kaj plenumu urĝajn bezonojn. Portu malpeze la eventualajn sinoferojn kaj sukcesu aspekti interesaj. Due, forĝu ne nur interpersonajn amikecojn ie-tie, sed inkluziveman kaj do kreskantan amikaron. Pentru ja esperantistan bildon pri la tutsocia estonteco. Sed fidu al unuopule ŝoforataj kreskoj, ne al devigoj. Servu sentrude, kaj per tiu servado kresku ĝis tutsocia amplekso.

Malfacila tagordo, kaj pensinstiga. La inkluzivemo estas nekutima socia celo. En preskaŭ neniuj landoj ĝi anstataŭis la militan kaj ekonomian konkernemojn. Ni devos gimnastiki por lerni fleksi la menserojn laŭ tiu por multaj nova impulso. Mi provas ĉi tie kunfleksi kun vi iujn el la priaj muskoloj.

Nur lastatempe komencis stabiligi nova mondomapo de memstaraj landoj. Iuj demandoj de la koloniismo plue atendas pritrakton. Tamen jam postulas atenton demandoj postimperiaj.

En ĉiu hodiaŭa socio, nur malmultajn problemojn oni povus rigardi kiel principe solveblajn per refaro de la interŝtataj limoj sur la mapo (la milito estas nur la plej tradicia metodo redesejni tiujn limojn). Notu, ke eĉ tiuj malmultaj tradiciaj problemoj draste ŝanĝis sian aspekton.

Jes, ie-tie iuj eŭskoj aŭ ĉeĉenoj fleugas la klasikan deziron secesii. Sed ĉu estas ĝenerale kredate, ke tia secesio kreos helan estontecon? Pensante pri la eŭskoj, ekzemple, oni demandas sin, kiamaniere la piza kaj bolonja procezoj povas inkluzivi ankaŭ la eŭskojn en la ekestanta Eŭropo. La interlerneja piza procezo kaj la interuniversitata, bolonja, simbolas en ĉi tiu rezonfadenno la gravecon de la edukiĝo. Kial ni tiom atentigas ĝin?

Tradicie, la naci-ŝtato edukis siajn infanojn al sianacia civitaneco. Intervenoj ĝuste en tiu sfero refaras la psikan mapon de la mondo rilate la difinojn de la plenkresko. Ni troviĝas meze de granda reconceptiĝo de la eduko. La klasika unulingva naciŝtato edukis en unika nacia lingvo. Tiu socia realaĵo ŝanĝiĝas — kaj samtempe aliĝas la respondecigoj de nia movado.

Lapenna iam gvidis nin kiel movadon de naciaj asocioj, kies anoj fruaĝe lernis fidele direkti unikan amon al siaj sio-muldaj *hejmo*, *patrujo*, *naci*’ (laŭ *La tagiĝo*) kaj maturaĝe batalas same fidele por neŭtrala interlingvo, kiu kronos la ĝeneralan federaciismon. La epoka doktrino, kiun li inde reprezentis, ja ne renkontis verajn esceptojn ĉe Belgio aŭ Svislando. Iliaj lingvoj okupis diskretajn teritoriojn. Sed ne tiel povas funkcii la hodiaŭa Eŭropo. Ĝi ne nur bazas la ekonomion sur la libera interlanda trafiko de laboremuoj. Ankaŭ en sia remuldo de la eduko kaj de la publika sfero ĝi ekatentas etnojn ne ligeblajn al diskretaj federacioj — inkluzive de enmigrintoj el foraj mondpartoj.

Ne nur la maljunuloj, sed ankaŭ la somalaj svedianoj, aperantaj en la fikcio de Sten Johansson, bezonas amikecon de tiu malfacila speco, kiu postulas de ni fortostreĉon. Koncepti tian somalon kiel anon de somala diasporo (memvola aŭ ne) ne helpas. Bronzetti petas de ni memremuldon. Kiel nia amikemo fariĝu karakteriza trajto sen troe streĉi niajn personecojn? Ne



temas agi surbaze de vota, sinsuferiga fideleco al altaro. Necesas kreski al tia amikado, kaj konkrete demandi sin, kiel la kresko tien povas okazi graŭ kaj ne malgraŭ la fluo de la ĉiusektora persona maturiĝo. Se ni sane kreskos, ni kapablos esti sindonaj sen ia sinvipema oferegemo.

Teo Jung iam diradis, ke Esperanto estas facila por komencantoj kaj malfacila por progresintoj. La amika sinteno estas parto de tiu malfacileco. Homo finlernanta Esperanton interalie tenas sin en la pozicio de kreanto de faciligoj. Kun Bronzetti, ni aplaŭdu tiun amikeman Renaton Corsetti, kiu insistas, ke ĉiu el ni uzu lingvaĵon maksimume amikan al koreaj aŭ indoneziaj komencantoj. Li neniam petis, ke tion farante ni martiru dentogrince. Renato evidente ĝue uzas simplajn vortojn, kaj ekzemplas por ni modelon, laŭ kiu maturaj lingvouzantoj suple manipulas la lingverojn kaj tiel esprimas gastamon al novaj enirintoj.

Bronzetti certe rimarkis, ke estas io profunde amikema en tiu vivlonga stila fideleco de Renato al facilaj, gastamaj *hejmo*, *patrujo*, *naci*’ — io amikema en la malfacila konservado de tiu struktura diafaneco. Esperantistoj ofte aranĝas kongresojn. Ni bone scias, ke la unusemajnan restadon de nove venintaj homoj faciligas lokanoj, kiuj volontulis vivi en fortostreĉo monatojn aŭ jarojn. Ni scias ankaŭ, ke bonetosa kongreso konstatigas al la multe laborintaj gastigantoj, ke valoris la penon. Temas streĉi tiun nian kutiman, simplalingvan, kongresaranĝan manon, al la neverduloj, kiuj pro nia tro interna ideo ofte ne spertas nian donemon; temas tiamaniere finlerni nian lingvon. Mi, kiu patologie kutimas skribi malfacile, esperas finlerni ĝin kun vi.

Probal Dasgupta

Parlamentaria iniciato en Slovenio

(Nun) Slovena parlamentano, d-ro Marko Pavliha, 31 aŭg transdonis al la parlamento la findokumenton de la 7a kongreso de la Eŭropa Esperanto-Unio (Maribor, 28 jul – 4 aŭg 2007). La dokumento petas la slovenan registaron:

a) subteni iniciaton de slovaka vicprezidanto Ĉaplovič postuli de la Eŭropa Komisiono trakti je interregistara nivelo eŭropan lingvan politikon;

b) proponi al la Eŭropa Komisiono establon de nova fondaĵo, kiu financus projektojn de nefortaj neregistaraj organizoj rilataj al poreŭropa edukado;

c) proponi al la Eŭropa Komisiono eksperimentan volontulan edukadon en eŭropaj lernejoj pri eŭropa identeco kaj valoroj kies parto estus lernado de Esperanto;

d) dum sia prezidado de la Eŭropa Unio en 2008 uzi en informado interalie ankaŭ Esperanton;

e) rekomendi al la Eŭropa Komisiono konsideri la propedeŭtikan valoron de Esperanto kiel lernfaciligilo por lernado de fremdaj lingvoj en EU.

D-ro Pavliha jam transdonis en la pasint-jara novembro samtipan proponon al la slovena parlamento. Krome 7 maj 2007 li intervenis en debato en la slovena parlamento pri nacia strategio por la slovena lingvo, subteninte la ideon uzi Esperanton en EU.

Zlatko Tišljarić

La nova Estraro dividis taskojn

La nova Estraro de UEA, elektita en la 92a UK en Jokohamo, decidis pri disdivido de ĉefaj respondecoj.

Prezidanto **Probal Dasgupta** respondecas pri kunordigo kaj ĝenerala planado de la agado. Vicprezidanto **Ranieri Clerici** gvidos la eksterajn rilatojn de la Asocio, dum la reelektita alia vicprezidanto **Claude Nourmont** plu respondecas ankaŭ en la nova Estraro pri edukado, kulturo kaj kongresoj. **Barbara Pietrzak** okupiĝos, krom pri kutimaj taskoj de ĝenerala sekretario, ankaŭ pri informado. **Loes Demmendaal** estas estrarano pri financo kaj administrado. Pri landa kaj regiona agado respondecas **Hori Yasuo**, dum **José Antonio Vergara** ekgvidas la fakan kaj scienca agadon de UEA.

La estraranoj dividos inter si poste diversajn specifajn taskojn. Dum la proksimaj monatoj ili ankaŭ elektos multajn komisionojn kaj komisiitojn.

GK UEA



Guillem Sevilla maldekstre kaj Joan Inglada dekstre prilaboras la asocian identecon de la Kataluna Esperanto-Asocio.

Jubilea simbolo de UEA

19 aŭtoroj aŭ aŭtoraj duopoj el 12 landoj partoprenis la konkurson pri simbolo por la 100-jariĝo de UEA, festota en 2008. Preskaŭ ĉiuj sendis pli ol unu proponon aŭ plurajn variantojn de sama propono. Deklarante la konkurson la Estraro de UEA deziris, ke la simbolo “emfazu la 100-jaran historion de UEA kaj la aktualecon de ĝiaj celoj kaj idealoj”, kaj ke ĝi estu “elvoka, laŭeble simpla kaj uzebla presite kaj elektronike”.

Du UEA-Estraroj partoprenis en la prijuĝado. La malnova Estraro elektis kvin proponojn por la “finalo”, lasante la finan decidon al la nova Estraro, elektita en Jokohamo. Tiu ĉi unuanime juĝis la verkon de Guillem Sevilla la plej taŭga. La laŭreato estas 24-jara dezajnistino el Barcelono, membro de la Kataluna Esperanto-Junularo.



Guillem Sevilla klarigas, ke la simbolo emfazas “per simpla kaj aktuala aspekto la tut-teran disvastiĝon de la neŭtrala lingvo Esperanto, atingitan grandparte danke al UEA”. La simbolo “subtile rilatiĝas al tradiciaj esperantismaj identigiloj (stelo), sed ĝi uzas ankaŭ eksterajn identigilojn (parolvezikoj, kvin koloroj) rekoneblajn de la publiko, kiu ne konas la esperantistan heraldikon”. La elektita emblemo ne havas unu fiksan formon, sed “temas pri fleksebla identiga sistemo kun senfinaj potencialaj variantoj depende de la bezonoj kaj rimedoj”.

Variantoj de la nova simbolo estas elŝuteblaj ĉe <http://www.uea.org/dokumentoj/simbolo/>.

GK UEA

AIS kun nova prezidanto

Dum la unua semajno de septembro 2007 okazis la 30a Sanmarineca Universitata Sesio de AIS. Ĝi enhavis ne nur la kutimajn kursojn, prelegojn kaj ekzamenojn; ĉar 2007 estas la lasta jaro de kvarjara ofic-periodo, necesis elekti novan estraron.

OProf. Dr. habil. Helmar Frank, kunfondinto kaj multjara prezidanto de AIS, jam en 2004 anoncis, ke la tiam komenciĝanta ofic-periodo estos lia lasta. Li ne povis antaŭvidi, ke malsano malhelpos lin ĉeesti en SUS 29 kaj SUS 30. Anstataŭ li vicprezidanto Minnaja transprenis la taskon gvidi la akademion en novan epokon.

Prezidanto de AIS dum la jaroj 2008–2011 estos OProf. Fabrizio Angelo Pennacchietti el Torino, internacie konata fakulo pri semida filologio. Lin subtenos kvar jam ĝisnunaj senatanoj. La unua decido de la nova senato estis honori profesoron Frank per la honora prezidanteco de AIS.

La fina sabato de SUS 30, kun la studfinaj ekzamenoj, okazis en la urbo San-Marino, kie la kultur-ministerio disponigis al AIS la belan salonon de la ŝtata muzeo. La antaŭaj tagoj, kun la kursa kaj prelega programo, okazis en proksima Rimini; tie la loka Esperanto-grupo disponigis al AIS la ejojn de CER-ES (Centro Esperantista de Rimini — Ekumena, Solidareca).

La kursa programo de SUS, kiu pro la divers-fakeco de la studentoj tradicie orientiĝas je abiturienta nivelo, ĉi-foje ofertis sep kursojn pri ekonomiko, informadiko, filologio, historio, astronomio kaj ergonomio. En la prelega konferenco okazis kontribuoj pri ekonomia terminologio, informadiko, psikologio, pedagogio kaj filozofio.

La prelego de EProf. Sara Konnerth pri “AIS, la virtuala Universitato de San-Marino” samtempe estis enkonduko al la publika “Akademia Forumo”, kiu okupiĝis ĝuste pri la demando “Kiom virtuala estu AIS?”. AIS klopodos en la sekvaj jaroj suplementi sian interretan instru-programon, nun precipe unudirektan, per duflankaj kontaktoj inter instruantoj kaj studentoj, per retroŝto kaj retbabilado.

En San-Marino okazis unu bakalaŭra, kvar magistras kaj du doktoraj ekzamenoj. Ĉiuj kandidatoj sukcesis. Vicprezidanto OProf. Minnaja kaj la direktoro de la ekzamen-ofico, OProf. Quednau, transdonis la diplomojn.

Reinhard Fössmeier

La Civito ĉe la Mondfederistoj

Giorgio Silfer alportis oficialan saluton de la Esperanta Civito al la kongreso de la mondfederistoj, laŭ invito de la kongreso mem, 28 aŭg 2007. Akceptante la inviton, la Konsulo rimarkis ke li “celas kontribui al la politika debato, nome de la esperanta popolo: oni ne atendu de mi la kutiman varban paroladeton pri la facileco kaj tutmondeco de la lingvo”.

La mondfederisma movado festas ĉi-jare sian sesdekan datrevenon. Preskaŭ samaĝa kiel UN, ĝi karakteriziĝis kiel opinimovado por la reformo de UN laŭ federismaj principoj. Tial estas tute kompreneble, ke inter ĝiaj ideologoj situas la nomo de Edmond Privat. La granda ĝenevano mem prezidis paralelan kaj pli fruan movadon, la Universalan Ligon, kiu aldone al mondfederismo celis enkonduki internacian lingvon (esperanto) kaj internacian monon (la Stelo).

La mondfederisma strategio ne kontraŭas la ekziston de UN (male al aliaj mondialistoj, specife la plej anarkiisma franĝo de la mondĉivitanoj), sed klopodas influi la evoluon de la “Vitra Palaco” al efektiva registaro de monda federisma demokratio. La strategio donas siajn fruktojn per la kreo ne de alternativaj instancoj (male al la taktiko de la mondĉivitanoj) sed de institucioj komplementaj al UN. La plej grava lastatempa sukceso tiurilate estas la kreo de la Internacia Krim-Kortumo (ne agnoskita de Usono). La mondfederisma prezidanto, la usona William Pace, estas unu el la plej gravaj fakuloj pri la Internacia Krim-Kortumo: pri la temo li estis invitita prelegi okaze de la Somera Universitato pri Mondialismo en Ĉaŭdefono, pasintjare.

Mondfederistoj havas internacian membrokarton (ne legitimilon), sed samtempe aktivis en aliaj federismaj organizoj. En Italio, ekzemple, la sekcio de la mondfederisma movado koincidas kun la itala sekcio de Eŭropa Federisma Movado. Tio signifas ke, kiuj laboras por unuigita kaj federita Eŭropo, tiuj laboras ankaŭ por unuigita kaj federita mondo.

La saluta alparolo estas legebla en www.esperantio.net

HeKo

La apuda foto (de Matsumoto), rezervita al LODe en ekskluziveco, montras la saluton de la Konsulo en Ĝenevo. La prezidumo aŭskultas kaj/aŭ legas la tradukon de lia alparolo.



La paneldiskuta podio (Foris Andrzej Sochacki)

Esperanto en la pola “Davos”

Danke al Halina Komar, aktivulino el Nowy Sącz, trideko da esperantistoj ĉeestis 5–8 sep 2007 en la Ekonomia Forumo en Krynica Górská (Pollando), kutime nomata la pola “Davos”. En ĉi tiu forumo okazis paneldiskuto *EU — krizo kaj ŝanco pri lingva komunikado*. La paneldiskuton gvidis d-ro Seán Ó’Riain, kaj en ĝi diskutis, interalie, prof. Reinhard Selten, prof. Witold Stepniewski, d-ro Barbara Despiney-Nochowska, Aida Ĉiĝikaitė, Etsuo Miyoshi.

Per la Esperanta stando ministroj, prezidentoj, sciencistoj kaj aliaj forumanoj eksciis pri Esperanto.

Andrzej Sochacki

Prezidema Corsetti

Renato Corsetti iĝis prezidanto de la Itala E- Federacio (IEF) komence de septembro en la 74a Itala Kongreso de Esperanto en Pizo.

La elekto de Corsetti okazis post voĉdono en la nacia konsilantaro de IEF. Kiel vic-prezidanto estis elektita Aldo Grassini. Ĝenerala sekretario iĝis Laura Brazzabeni kaj kasisto Riccardo Pinori. Aliaj estraranoj: Ranieri Clerici, Marco Menghini kaj Nicola Ruggiero.

El Libera Folio

La Senato aprobis

La Senato de la Esperanta Civito aprobis 23 aŭg 2007 la leĝon pri la familia juro. La leĝo estis aprobita unuanime.

“La unuanimeco okaze de la aprobo signifas ke la Blanka grupo taksas la normojn kongruaj kun la kristanaj principoj”, — deklaris sen. Anna Bartek. Efektive la Verda grupo bezonis apartan kunvenon por kompaktiĝi pri la art. 14 de la leĝo, kiu koncernas adoptojn. Parto de la Verda grupo kontestis la referencon al la Svisa Civila Kodo, konsiderata kiel restriкта por la samseksaj paroj. La mediacio de la Konsulo kondukis al homogena pozicio.

Mankis unuanimeco ĉe la rezolucio pri Tibeto, ĉar la Ruĝa grupo, decidis ne partopreni en la baloto. Verdanoj kaj Blankanoj aprobis rezolucion kiu igas propra la deklaron de la IKEL-prezidanto, Daniele Vitali. Pri la temo la starpunkto de IKEL, plene kongrua kun tiu, pli frue esprimita, de la Konsulo, koincidas kun tiu de la Civito.

Ekologiismo karakterizis la rezolucion pri Amazonio, kiu tamen ampleksas pli vastan temaron, inkluzive al la subteno (ankaŭ per esperantigo) al la filmo de la usona parlamentano Al Gore pri la klimatoŝanĝo.

HeKo



Mitoj kaj legendoj

Mitoj kaj legendoj estis la ĉefatemo de la Internacia Esperanto-Konferenco (IEK), kiu okazis 14–23 jul 2007 en la bulgara urbo Pazarĝik. En la malfermo la urbestro de Pazarĝik Ivan Evstatiev salutis la partoprenantojn, kiuj venis el Belgio, Britio, Francio, Germanio, Grekio, Hispanio, Hungario, Nederlando, Rumanio, Svislando kaj Bulgario.

IEK komenciĝis per koncerto de la Virina Esperanto-Koruso de Pazarĝik. Estis inaŭgurita ekspozicio de grafikoj de la fama bulgara grafikisto Nikola Mitov — Kumaricata.

La ĉeestantoj aŭskultis interesajn prelegojn de Aleksandar Arnaudov (Legendo pri la preĝejo Sankta Dipatrino), Georgi Mihalkov (La riĉeco de la legendoj en la vilaĝoj ĉe Sofio), Mantha Christou (La grekaj mitoj en la historio kaj vivo), David Kelso (Nacia identeco surbaze de mitoj kaj legendoj), Maria Butan (La digneo en la rumanaj legendoj), Abel Montagut (Mitoj kaj legendoj), Ljubomir Trifonĉovski (Esperanto inter mitoj, legendoj kaj realo), Radka Stojanova (La amikoj kaj kalifo), Petar Todorov (Legendoj el regiono Vraca), Nedelin Bojaĝiev (Mitoj pri Orfeo kaj orfeismo), Eva Bojaĝieva (La amo en la mitoj).

La premio de OSIEK, kiu organizas la Konferencojn, ĉi-jare estas atribuita al Ĵak Le Puil kaj Armelle LeQuint pro la traduko de *Vojaĝo ĝis noktofino* de Louis-Ferdinand Céline.

La partoprenantoj vizitis la urbajn muzeojn, kaj post IEK okazis tri tuttagaj ekskursoj al urbo Plovdiv kaj Starosel, en kiu estas granda traka tombejo, al monaĥejo Baĉkovo kaj al la urboj Kazanlak kaj Karlovo.

Julian Modest

Ardaj debatoj en Kazanlak

La 59a Kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio okazis 31 aŭg – 2 sep en Kazanlak, kiu troviĝas en la fama Roza Valo. La unuan kongres-tagon en la urba ĵurnalo *Iskra* (Fajrero) aperis ampleksa artikolo, en kiu oni menciis, ke la urba Esperanto-societo *Roza Valo* estas unu el la plej malnovaj bulgaraj societoj, kaj ke en Kazanlak naskiĝis kaj loĝis famaj bulgaraj esperantistoj Ivan Sarafov (aŭtoro de Esperanto-lernolibroj) kaj Luna Davidova (aktorino de la Bulgara Esperanto-Teatro).

La Kongreso estis inaŭgurita en la salono de la Armea Kulturdomo. La kongresanojn salutis ano de la urbestro Galja Stojanova kaj reprezentantoj de diversaj esperantistaj asocioj.

La prezidanto de BEA Petar Todorov raportis pri la agado de la Asocio dum la pasinta jaro. Milĉo Beloreški prezentis la raporton de la Kontrola Komisiono. Post la raportoj komenciĝis diskutado. Tre multaj debatoj okazis pri la raporto de la Kontrola Komisiono, en kiu estis multaj malveraj faktoj, kaj la Kongreso ne akceptis la raporton. Bonajn proponojn por la estonta agado de BEA faris Dimitar Haĝiev, prof. Bojidar Leonov, Dimitar Papazov, Vladimir Ĵelev kaj aliaj.

La Kongreso elektis honorajn membrojn de BEA: Cvjatko Todorov el Ŝumen, Vladimir Ĵelev el Plovdiv, Boris Angelov el Smoljan kaj Vasja Cvetkova el Sofio.

Kvar personoj estis kandidatigitaj por la prezida posteno en BEA: Petar Todorov, Bojidar Leonov, Vladimir Popov kaj Canko Ignev. Ĉar Popov kaj Ignev ne ĉeestis, la delegitoj voĉdonis por Todorov kaj Leonov. En la sekreta voĉdonado Petar Todorov estis elektita kiel la prezidanto de BEA.

Georgi Mihalkov

ILEI konferencis pri virinoj

La 40a ILEI-konferenco okazis 11–19 aŭg en Ranzan (Japanio) kun 70 partoprenantoj el 23 landoj. Plejparto de la konferencanoj venis el ekster Japanio sed, bedaŭrinde, neniu venis el Koreio kaj Ĉinio malgraŭ sufiĉnombraj partoprenantoj en la UK en Jokohamo. La Konferenco tamen estis ne 100-procente sed preskaŭ sukcesa kaj kontentiga al ĉiuj.

Ĉi-foja konferenca temo estis *Virinoj en Esperanto-Kulturo*. En la ĉeftema simpozio partoprenis ne nur konferencanoj sed ankaŭ kelkaj pliaj interesitoj; salutparolis vicdirektorino de la konferencoj: Ŝtata Eduk-Centro por Virinoj. La ĉefprelego de Spomenka Ŝtimec “Virinoj en Esperanto-Literaturo” altiris ĉies atenton pro ŝia altkvalita kaj enhavoriĉa parolado. Sekvis prelegoj pri virina agado en la Esperanto-Movado en la 1970–80-aj jaroj. Pri la eldono de *Sekso kaj Egaleco* parolis Anna Lowenstein kaj Setsuko Yamakawa, kiu eldonis la japanlingvan version de la gazeto. Toyohiko Kaba prelegis pri Verda Majo, kaj sekvis tri prelegoj rilate al sekso kaj genro aŭ seksismo en Esperanto de Renato Corsetti, Aloyzas Gudavičius kaj Vera Barandovská-Frank, kiu mem ne ĉeestis. La simpozio daŭris la tutan tagon.

Dum la ILEI-konferenco ĉiujare abundas interesaj seminarioj, prelegoj kaj aktivadoj. Lingva Festivalo estas unu el ili, kaj ĉi-foje 20 lingvoj estis prezentitaj. Diverstemajn seminariojn kaj prelegetojn gvidis Zsófia Kóródy, Dennis Keefe, Kimie Markarian, Ana Montesinos, Terezija Kapista kaj aliaj. Mirinde estas, ke ĉiuvespere oni vigle aktivis ĝis la 23a horo.

Ĉi-foje ni dividis la konferencon en du partojn: la unuajn kvar tagojn por kutima programo kaj laboro, kaj la lastajn kvar tagojn por ekskursoj kaj kursoj pri japana kulturo. Ni vizitis Nikkon, mondheredaĵo de UNESCO, kaj la urbon Kawagoe kie ankoraŭ restadas etoso de la Edo Periodo (17-19 jc.). Kursoj de Te-ceremonio, Ikebana (floraranĝo), Furoŝiki (paktuko), Origami kaj Kimonovestado estis plena de homoj kaj ĉiuj ĝuis novan sperton.

Pro manko de tempo, eĉ post tiuj distraj kursoj ni havis kelkajn seriozajn seminariojn. Dum la tuta periodo de konferenco, ni kantis, dancis, babilis kaj fariĝis bonaj geamikoj.

Tieko Isikawa



Grupo da IEKanoj en Pazarĝik

ICH distingita de UEA

Interkultura Centro Herzberg (ICH) kaj la Esperanto-urbo Herzberg estis reprezentataj dum la 92a UK kaj en la ILEI-konferenco en Japanio.

La nova Esperantlingva turisma broŝuro, la bildkartoj kaj aliaj informiloj vekis grandan interesiĝon dum la Movada Foiro en Jokohamo. La KD kun prezentadmaterialoj, fotoalbumoj kaj katalogoj de la ICH-biblioteko same apartenis al la movadaj novaĵoj. En la kongresa Tago de Lernejo Zsófia Kóródy raportis pri la rezultoj de la lerneja instruado de Esperanto en Herzberg, dum la kunsido pri ĝemelurba agado ŝi rakontis pri la opaj paŝoj de la jam dujara modelprojekto kun la partnerurbo en Pollando.

Bela momento estis dum la oficiala malfermo de UK la transdono de la novfondita “Diplomo de UEA pro elstara agado por la Internacia Lingvo Esperanto”. En 2007 ĝin ricevis usona esperantisto Don Harlow kaj ICH.

Ni dankas al ĉiuj, kiuj helpis nian ĝisnunan agadon kaj kontribuis al la multfaceta laboro. Estas bezono je plua daŭra subteno, se la Esperanto-movado ŝatus atingi, ke la internacia lingvo estu pli kaj pli videbla, spertebla parto de la ĉiutaga vivo de Herzberg — la Esperanto-urbo.

La kolora faldfolio pri Herzberg kaj la kvar bildkartoj estas mendeblaj kaj de la Turisma Oficejo de la urbo kaj de la Esperanto-Centro.

Zsófia Kóródy

Mondsensaciato: Esperanto-pico

Ducentjara rondforma picotradicio estas rompita!

En la Esperanto-urbo Herzberg Felice Marcovecchio de *Pizzeria Mamma Mia* kreis kvinpintan “Esperanto-picon”. En la mendolisto ĝi havas la konstantan numeron 106.

Sur la kvinpinta Esperanto-pico troviĝas tomatoj kaj fromaĝo kaj tavolo kun amareta eruko. Tio garantias verdkoloran aspekton. La unuaj gustumintoj de la nova kreaĵo estis: Gian Carlo Fighiera el Torino, Ingo Sommer, Uwe Weidehaus kaj Peter Zilvar.

Nova ampleksa esperantlingva manĝokarto estis tradukita de la itala samideano Gian Carlo Fighiera.

Ĉiuj laŭdis la novan Esperanto-produktaĵon, kiu estas ne nur bongusta kaj satiga plado, sed ankaŭ bona reklamo por Esperanto.

ICH



Jokohamo: Zsófia Kóródy kun la diplomo de UEA

Esperanto, la ekumena lingvo

21–28 jul en la idilia urbeto Pelplin (Pomerio, en la norda parto de Pollando) okazis la 18a Ekumena Esperanto-Kongreso sub protektado de la urbestro Andreo Stanuch.

La kongreson kunorganizis kristanaj esperantistaj asocioj IKUE (romkatolika) kaj KELI (evangeliisma), helpe de la Koĉevia Filio de PEA kaj Esperanto-Klubo *Kastelo* (Malborko). Partoprenis ĉ. 240 geesperantistoj el dudek landoj, inkluzive de la 18-persona junulara grupo.

La ĉefa temo de la kongreso estis: “...Dio estas la amo. La ĉefa donaco de Jesuo — kaj ni...?” Okazis multaj prelegoj, ekz-e, “Ortodoksa vido de la kristana amo” (prof. Bojidar Leonov, Bulgario), “Pri la kristana amo” (sac. Bernhard Eichkorn, Germanio), “La ĉefaj pensoj de papo Benedikto la 16a pri amo” (d-ro Roman Forycki, Pollando), “Pri agado de Jacques Tuinder: Evidente — praktika amo de blinduloj” (Siegfried Krüger, Germanio), “Pri Konstanteno Dominik, episkopo kaj esperantisto” (d-ro Eligiusz Sitek, Pollando), “Pri la aŭtoritato en Protestantaj Eklezioj” (Philippe Cousson).

En la riĉa arta programo partoprenis, interalie, Koĉevia folkloro ensemblo *Modraki* (Cejanoj) kun riĉa Esperanta repertuaro, Kaŝubia infana kantkaj danc-ensmblo *Slunôszka* (Sunetoj) kun regalo de snuf-tabako, klarinetisto Marko Marczewski, knabina E-grupo *Kvarope* el Pelplino. Okazis ankaŭ koncerto de aŭstralia koruso en la Pelplina katedralo kaj organa koncerto en la katedralo en Oliwa dum ekskurso en Gdansk kaj Sopot.

Miloslav Šváček, kiun oni reelektis kiel la prezidanton de IKUE, dum la Sankta Meso en la Pelplina Katedralo ricevis solenan benon de 11 sacerdotoj.

En la tria kongres-tago estis inaŭgurita obelisko *Por la paco en la mondo* en la Parko de la Mondo en Malborko. La obelisko — donaco de la Esperanto-Societo de Seattle (Usono) — enhavas surskribon “Paco regu sur la Tero” en ses lingvoj: Esperanto, pola, angla, germana, rusa kaj franca. Ĝi estas jam la 35a ZEO en Malborko. La obeliskon kuninaŭguris honora civitano de Usono profesoro Georgo Dobrzyński, prezidanto de IKUE Miloslav Šváček kaj prezidanto de KELI Philippe Cousson, en ĉeesto de la urbestro de Malborko, Dariusz Denis, kaj de la prezidanto de la urba konsilantaro, Tadeusz Woźny. Poste la kongresanoj vizitis la Malborkan Kastelon, kiu estas la plej granda brika mezepoka kastelo en Eŭropo.

La seminariejo, Collegium Marianum kaj la 14-jarcenta katedralo, donis al la kongreso kreivan etoson kaj spiritan atmosferon, kaj dum sep tagoj fariĝis por kongresanoj vera Esperantujo. Multaj esperantistoj volonte promenadis en florabunda episkopa ĝardeno.

**Vinjo Maciejczak
Eduardo Kozyra**





Du tute novaj ankoraŭ analfabetaj lernantinoj de *Bona Espero* embarasite rigardas la grandan amason da festantaj homoj.

Jubileo de Bona Espero

En 1957 *Bona Espero* estis fondita de brazilaj esperantistoj, kaj ek de tiam ĝi akceptas infanojn el socie riskaj situacioj por protekti, nutri, eduki kaj instrui, donante al ili ŝancon senti sin civitanoj kun homaj rajtoj. Precipe tiu agado estis necesega en la kampara regiono, kie mankis sociaj strukturoj por sanservoj kaj lernejoj.

Certe *Bona Espero* ne savos Brazilon, sed ĝi donis signifan kontribuon por helpi al kelkcentoj da infanoj, kiuj intertempe plenkreskis, laboras kaj zorgas por sia propra familio en dignaj kondiĉoj.

Kaj ĉio sub la signo de Esperanto, per la laboro de volontulaj Esperanto-parolantoj kaj per la financa kontribuo de multaj esperantistoj el pluraj landoj.

Oni povas diri, ke la nuna institucio kun mil-hektara tereno kaj ok domoj, kun centoj da fruktoarboj kaj bone funkcia strukturo de akvo kaj energio, estas propraĵo de la tutmonda esperantistaro, administrata de kvinpersona estraro, kiu, estante publik-utila institucio, respondecas antaŭ la brazila ŝtato.

1 jul 2007 *Bona Espero* invitis siajn ekslernantojn kaj geamikojn por kune festi la kvindekjaran jubileon. La festparoladon faris unu el la ses fondintoj, inĝ. Machado Nunes, kiu venis speciale por tio el la fora nordoriento de Brazilo. Same plu vivas en Recife, sinjorino Neuza Esteves Araujo, sed pro troa aĝo (89 jaroj) ne povis veni.

La feston partoprenis pli ol 200 gastoj, inter kiuj eksaj lernantoj, kiuj iam antaŭ 30 jaroj lernis legi en *Bona Espero* kaj tiuj lernantoj kiuj nun studas en universitato.

Ursula Grattapaglia

Somera Festivalo en Barlaston

Interrompis la ritmon de la ĉi-jara somera festivalo en Barlaston televida skipo, kiu faras sep-minutan filmeron pri Esperanto, dissendotan verŝajne en februaro.

Publico por Esperanto, aparte en populara programo pri kampara vivo, teorie bonvenas. Tamen intervjuatoj, kies studsesioj estis iom ĝenataj pro la demandoj de la raportistino kaj la ĉeesto de la kamerao, sentis, ke la skipo celas akcenti malpli la gravecon de Esperanto kaj pli la strangecon de inventita lingvo parolata en kampara angla vilaĝo kiel Barlaston.

Laŭ dokumento postlasita de la skipo, la raportistino ŝajne informis, ke en Barlaston ne eblas matenmanĝi, se oni ne povas mendi la deziratajn pladojn en Esperanto. Mensogo! La televidistoj, kiel la somerfestivalanoj, regalis sin de memserva matenmanĝa bufedo. Memevidente povas esti, ke timoj pri moka raporto montriĝos senkialaj: tamen la vizito maltrankviligis.

Pli bonvena estis la ĉeesto de eksterlandaj vizitantoj, aparte Sergej Potoskujev kaj Lidija Jerofejeva el la ruslanda urbo Niĵnij Tagil (vidu la suban foton). Finkurse ili regalis somerfestivalanojn per rusa ĉokolado kaj vodko kaj disdonis poŝtkartojn pri sia urbo.



Venis cetere irlandano, John Murray, kiu kaptis la okazon por studi en la Biblioteko Butler.

Kvar duonsemajnaj kursoj plentempe okupis festivalanojn: unu por komencantoj, kiu uzis la vidbendfilmon *Pasporto al la tuta mondo*; du por progresantoj, kiujn gvidis Jack Warren kaj Malcolm Jones; kaj alia por progresintoj. Okazis dum la semajno laborseĝo, gvidata de Angela Tellier, pri la projekto *Lingvolanĉilo*: ĉ. 200 junaj anglaj gelernejoj nun lernas Esperanton por esplori aliajn lingvojn kaj por informiĝi pri monda kulturo.

La venontjara somera festivalo okazos 9–15 aŭg 2008.

Paul Gubbins

Prelego por milpersona publiko

Antaŭ la Jokohama UK nobelpremiito pri ekonomiko, prof. Reinhard Selten, venis al Kagawa. I aŭg okazis en *Royal Hotel* bonveniga festo por prof. Selten kaj s-ino Martha Heide Otto, germanino kun usona pasporto, kun kvalifikoj pri interpretado inter la lingvoj angla, franca, germana kaj Esperanto. Partoprenis eksa vic-guberniestro, rektoro kaj profesoroj de la Ŝtata Universitato Kagawa, urbestro kaj vic-urbestro de Higashikagawa, direktoroj kaj vicdirektoroj de la Unuiĝo de Japanaj Gant-Fabrikoj kaj pintuloj el diversaj branĉoj de industrio, artistoj, esperantistoj, Oomotanoj kaj anoj de la kompanio *Swany* — sume 170 personoj.

Post enkonduko, oni aŭskultis propra-stilan salutparolon de prof. Selten kiu post la ricevo de la Nobel-premio ricevas preleg-invitojn: du semajnojn antaŭe en Kamerunio, lastsemajne en Roma, kaj septembre en Pollando. La ĉeestantojn ravis ankaŭ la preciza kaj bela Esperanto de s-ino Otto. Plie, per la prezido en la japana kaj Esperanto far Hylco Miedema — instruisto de Esperanto kaj la angla ĉe *Swany* — unuiĝis la koroj de la ĉeestantoj. Laste oni spektis Danjiri infan-kabukon (tradicia japana teatro) kaj esperantistoj korusis *La Esperon*.

Sekvatage, malgraŭ tajfuno, en la Universitato Kagawa kunvenis 1070 homoj por aŭskulti la faman nobelpremiitan esperantiston. Rektoro Ichii salutparolis, kaj mi enkondukis prof. Selten kaj klarigis “kial prelegi en Esperanto”. Projekciitaj sur du podi-skalaj ekranoj estis tekstoj japanaj kaj Esperantaj, kaj prof. Selten surpodie promenante, precize prilumis la ludoteorion. Danke al la klara traduko de prof. Nagamachi el la Universitato Tokushima, oni diligente ĝis la fino aŭskultis la prelegon.

La aŭskultantoj ricevis dokumentojn pri la esenco de la ludteorio kaj pri la stato de Esperanto en EU, alvokon de Selten al la Eŭropa Parlamento *Trarompi la lingvan muron*, informojn pri Nitobe Inazo kiu en la 1920aj jaroj provis persvadi la Ligon de Nacioj akcepti rezolucion pri lerneja instruado de Esperanto.

Resume: la festo kaj la prelego respegulas kompanion kiu defias eksterordinaran taskon por la homaro. Plenumiĝis unu ero de la *Swany*-regulano.

Etsuo Miyoshi

Slava studado ne nur por slavoj

SES — tute freŝa kaj unuafoja **Slava Esperanto-Studado** — prenis malfacilan taskon kunligi la someron, tri diversnivelaĵajn Esperanto-kursojn, interŝanĝon kaj komparon de slavaj kulturoj kaj junular-aranĝan etoson.

SES okazis 21–27 jul en la hotelo *Esperanto* (vd. dekstre) en la ĉarma slovaka urbeto Pribylina, lime de la Tatra Nacia Parko. La organizan taskon prenis Slovaka Esperanta Junularo (SKEJ), kaj plejparto da organizado kuŝis sur la ŝultroj de la prezidanto de SKEJ, Peter Baláž. Tamen SES ne estus sukcesa sen kontribuo de internacia teamo da helpantoj, instruistoj, kaj personaro de la hotelo.

La ĉefa celo de SES estis kunligi lernadon de Esperanto kaj konatiĝon kun slavaj kulturoj. La slaveco forte sentebliis — ne nur en multaj programeroj dediĉitaj al slavaj lingvoj, kulturoj, tradicioj, naciaj trajtoj, sed ankaŭ en tio, ke plejparto el pli ol 50 partoprenantoj venis el slavaj landoj (Ruslando, Pollando, Slovakio, Ukrainio, Ĉeĥio) kaj nur 7 estis el neslavaj landoj (Litovio, Germanio, Nederlando, Katalunio, Svislando).

Krom la slav-temaj programeroj, grandan parton de la taga programo okupis Esperanto-kursoj. La komencantojn instruis slovako Stano Marček per sia nova rektmetoda libro. Pri la komencintoj okupiĝis Xosé Condes el Katalunio, kaj kun la progresantoj laboris ruslanda instruistino Irina Gončarova.

SES konsistis ne nur el prelegoj kaj lernado. Okazis ekskursoj al montopinto Poludnica, al subĉiela muzeo de Liptova vilaĝo kaj al Demänovská Groto de Libereco. Estis aranĝitaj vesperaj koncertoj de slovaka popola muziko kaj de Milan Dočekal, el la fama slovaka grupo TEAM. Ne mankis tradiciaj Esperantaj programeroj — interkona kaj internacia vesperoj. Vespere ĉiam oni havis eblecon spekti filmojn en Esperanto aŭ amuziĝi en diskoteko. La programon pliriĉigis diskutrondoj kaj kvizoj pri slavaj landoj. Oni povis okupiĝi pri manlaboroj kaj diversmaniere sportumi. La ruslanda grupo montris teatraĵon por la esperantistoj kaj por ekstera publiko en la subĉiela muzeo de Liptova vilaĝo.

SES estis sukcesa. Eble: surprize sukcesa, ĉar estis ĝia “naskiĝo”. Ĝi strebas iĝi ĉiujara somera junulara aranĝo, kies koncentriĝo je slaveco kaj studado daŭre lasos ĝin “alternativa”



kompare kun aliaj someraj aranĝoj por gejunuloj. Ekzistas ideo ĉiujare okazigi ĝin en malsamaj slavaj landoj. Malgraŭ la titolo, SES estas malfermita por ĉiuj, kiuj volas profundigi siajn Esperanto-sciojn, ekkoni interesan slavan kulturon aŭ simple ĝui la etoson, kretan de orienteŭropanoj.

Indrė Pileckytė

70 jaroj de Esperanto en BSF

La 6a Spirita Esperantista Renkontiĝo (SER-6), okazinta 9 sep en Bento Ribeiro (Rio-de-Janeiro) estis bonega laŭ la opinio de la plimulto inter 139 ĉeestantoj kaj de 20 “interretanoj” kiuj partoprenis per “Paltalk”.

La ĉefparolanto Afonso B.G. Soares dum unu horo parolis pri la ĉeftemo “70 jaroj de Esperanto en Brazila Spiritisma Federacio (BSF)” kaj dum 20 minutoj respondis demandojn de la ĉeestantoj kaj interretanoj.

En la arta programo estis: kantoj de Márcio Santos, Gallindo kaj gekantistoj de Esperanto-Grupo “Porto Carreiro Neto”; deklamoj de Djalma Pessata kaj gelernantoj de Esperanto-Grupo “Lazaro Luiz Zamenhof”; el humura skeĉo *En la Konsultejo*, kiun prezentis Djalma Pessata kaj Floriano. La tekstoj de ĉiuj kantoj kaj poemoj estis dulingve montritaj surekrane, kaj la skeĉo estis prezentita dufoje, en Esperanto kaj en la portugala, por la ĉeestantaj neesperantistoj kaj komencantoj.

La 7a SER okazos post unu jaro kun la ĉeftemo “Jesuo, Fonto de Evangelio, Spiritismo kaj Esperanto”.

Paulo Kverko

Jubilea SEFT

La 30a, jubilea, Somera Esperantista Feria/Familia Tendaro (SEFT) okazis 21–28 jul kun 71 partoprenantoj el Nederlando, Irlando kaj Germanio en vera tendaro ĉe Thomsdorf. La vetero estis iom miksa, kelkfoje pluvis kaj kelkfoje estis suna vetero. Sed pro pluvo neniu fuĝis hejmen.

Ĉiuvespere okazis fabelhorro por la infanoj kaj aliaj interesuloj, preskaŭ ĉiam estis montrataj du germanaj fabeloj.

Dum la nepluvaj tagoj partoprenantoj migradis en la ĉirkaŭaĵo — piede, boate, bicikle, kaj eĉ per kvarrada motorciklo “Quad”. Okazis ankaŭ ekskurso al la urbo Woldegk, kie la kirko ricevis novan pintegon sur la turo.

Ĉiun posttagmezon ekde la 16a horo okazis nia kafoklaĉo, kelkfoje eĉ kun prelegeto. La kafoklaĉon sekvis kurseto, kiun gvidis Werner Pfennig el Neubrandenburg.

24 jul estis kuirita supo por la tuta rondo, kaj 25 jul Klaas el Nederlando bakis kun kelkaj helpantoj bongustajn patkukojn kun pomeroj, ŝinko, sekvinberoj, fromaĝo kaj aliaj aldonaĵoj. 26 jul ni faris apud la Dreclago (germane: *Dreetzsee*) grandan bivakfajron kaj tie bakis bastonajn kuketojn. Samtempe kelkaj el ni kradrostis tie.

La kulmina programero estis la adiaŭa vespero kun bongustega porkidaĵo kaj aliaj manĝaĵoj.

La 31a SEFT okazos venont-jare tuj post la Roterdama UK.

Renė Philipp

Unufraze

★ Komence de septembro en Konakrio edukministro de Gvideno, prof. Elhadji Ousmane Souare k lia konsilanto pri lingvaj aferoj akceptis tripersonian gvidantaron de la Gvinea Frata E-ista Unuiĝo. (Landa Agado)

★ Ses aktivuloj de FEJO k EsperHE prezentis Eon en la mondvilaĝa festivalo *Maaailma kylässä*; EAF finance subtenis la partoprenon. (*Esperanta Finnlando*)

★ Laŭ iniciato de DEJO 45 e-istoj partoprenis organizadon de la somera rokfestivalo en Roskilde, la plej granda muzikfestivalo en la Norda Eŭropo. (*Esperanto en Danio*)

★ Sekcio por Laborjuro k Laborinspekto de la Aŭstria Ministerio por Ekonomio k Laboro uzas Eon en sia retejo en la fakoj “La laborloka taksado” k “Maŝinoj, laboriloj” (Leopold Patek)

★ 29 aŭg en Universitato Cândido Mendes, en ĉeesto de ĉ. 150 personoj, e-istino Neide Barros Rêgo estis enoficigita kiel membro de la Beletra Akademio de Niterói; Eo estis ofte menciata en la solenado. (Aloísio Sartorato)

★ En la fermo de UK-92 en Jokohamo estis anoncitaj premioj: *Premio Deguĉi* al Duilio Magnani (Italio), *Subvencio Cigno* al Kuba E-Asocio k al UEA-Agado “Lingvo de Paco”, *Trofeo Fyne* al Esperanto-France; en la oratora konkurso la unuan lokon gajnis Rolf Peter Fantom el Britio. (*Ondas Jokohamo*)

★ Samtempe kun UK-92 en la japana E-Domo Jacugatake okazis la 38a Internacia Infana Kongreseto kun 13 infanoj el Litovio, Belgio, Francio, Hungario, Japanio. (Povilas Jegorovas)

★ La 17an Internacian E-Kongreson en Ĉinio kun Tibeto k vojaĝon de Pekino tra Jinan-Quingdao-Hefei-Nankino-Suzhou al Ŝanhajo partoprenis 70 kongresanoj, el kiuj 27 daŭrigis, tra Seulo k Tokio, al Jokohamo por UK-92. (Esperantotur)

★ Ĉ. 250 personoj partoprenis la E-festivalon IRIS k la Hungarian E-Kongreson 21-28 jul en Zalaegerszeg. (*Zagreba Esperantisto*)

★ Margaretha Symoens, filino de la konata e-isto Edward Symoens, instruos dum la seminario organizata en Rumongo (Burundo) dum la venonta Pasko; la seminarion partoprenos lernantoj de la kurso *Gerda malaperis* el kelkaj afrikaj landoj prepare al ILEI-konferenco en Benino venontjare. (Landa Agado)



Ili kantis en RET-07 (Fotis Liliĵa Burgar.)

RET-07: Vi ne solas

15–25 aŭg 2007 en ripozejo *Lotos*, urbo Primorsko-Aĥtarsk, ĉe la Azova maro okazis Rusiaj Esperanto-Tagoj (RET-07) kun la slogano *Vi ne solas!*

Kvankam aliĝis pli ol 250 personoj, kaj la organizantoj prognozis tricenton de partoprenantoj, reale venis nur 183 (12 el Ukrainio, 3 el Francio, po 2 el Latvio, Germanio kaj Usono, po 1 el Pollando kaj Israelo, ĉiuj ceteraj el Ruslando). Kelkaj eksterlandanoj ne ricevis vizojn, pluraj ruslandanoj supozeble ne sukcesis aĉeti biletojn direkte al plej prestiĝa ripozregiono en la plej pinta sezono. Tamen RET-07 rezultis pli amasa ol ĉiuj aliaj ruslandaj Esperanto-renkontiĝoj de lastaj jaroj.

Cetere, oni ne trompiĝu pro la granda nombro: tute ne ĉiuj uzis Esperanton, grandparto venis ĉefe por nemultekoste ripozi en bona loko. Do ne malmultis homoj neniam lernintaj Esperanton kaj eĉ sen intenco lerni.

La programo estis tradicia por ruslandaj someraj aranĝoj. Furoris koncertoj de JoMo, Georgo Handzlik, Paŭlo Mojajev kaj de kelkaj ruslandaj bardoj. Menciindas diversnivelaĵoj kursoj kaj ekzamenoj, seminarioj de tradukistoj kaj de instruistoj, diskutrondoj, instruado de kantoj, fotokonkurso — ĉiam tri-kvar programeroj paralele. Okazis ankaŭ la malnovtradiciaj *Konkurso de Gajaj kaj Spritaj* kaj *Neptun-festo*. Estis aparta porinfana programo senrilata al Esperanto. Ĉiutage oni povis malstreĉiĝi naĝante en la maro aŭ bierumante en gufujo. Sed pro la tradicie riĉa programo enprogramaj “plaĝaj paŭzoj” estis nur dum paroliga periodo (tri unuaj tagoj), sed poste tiu, kiu volus partopreni ĉion, tute ne havus tempon por naĝi.

Kutime kaj bedaŭrinde, ĉiuj gravaj aferoj estis tro ligitaj al unu persono (kiu dum multaj jaroj en Esperanto-aranĝoj konstante firmigas sian personokulturon) — el kio nature sekvis oftaj malfruiĝoj kaj fuŝoj. Fortoj de la organizantoj apenaŭ sufiĉis por kunordigi la tuton, kaj se la aranĝo estus pli multnombra — regi ĝin tute ne eblus.

Jam kelkfoje REU-estraranoj publike konfirmis, ke “tendaroj” estas la ĉefa, eĉ preskaŭ sola ilia Esperanto-agado, sed eĉ sur tiu malvasta tereno ili agas pli kaj pli mise, ne komprenante ke malnova paradigmo jam ne taŭgas. Facile konjekteblas do, ke kun tiaj principoj kaj stilo de laboro ne estas senco eĉ revii pri UK en Ruslando dum proksimaj jardekoj, malgraŭ multjara “komuna revado”, ĉiam denove instigata de la nuna REU-prezidanto...

Valentin Melnikov

Ekotur 2007

Jam tradicia ekoturisma aranĝo en Ĉeĥio EKOTUR 2007 okazis dum la unua julia semajno apud Karlovy Vary. Ĉi-jare venis malmultaj partoprenantoj, do la etoso estis pli intima, sed certe ne malpli interesa. Oni ekkonis la naturon kaj turismajn vidindaĵojn en la proksimeco, inkluzive de la montaro Krušne Hory kaj la banloko Karlovy Vary, kie ĝuste tiutempe okazis la fama internacia Filmfestivalo.

La venonta Ekotur okazos en aŭgusto 2008 proksime de Prago. Oni loĝos proksime de la burgo Karlštejn kaj esploros, denove ĉu piede, ĉu en la selo de biciklo, la Bohemian Karston kaj la montetaron Brdy. Informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi de chrldle@kava-pech.cz.

Petro Chrldle

La angla venkas dank' al Sarkozy

(Vide el Bruselo) La nova franca prezidanto Nicolas Sarkozy preparas la vojon al plia venko de la angla kiel scienca lingvo.

Kelkajn semajnojn post sia prezidantiĝo, sub la premo de angligitaj francaj grandentreprenoj, Sarkozy signalis akcepton de la Londona Interkonsento. Laŭ tiu dokumento necesas traduki eŭropajn patentojn nur anglan, ne plu nacilingven. Kvankam la Londona Interkonsento malaltigos la kostojn por la eŭropaj patentoj, ĝi konfirmos la statuson de la angla kiel la sola internacia scienca lingvo. Ĝis nun, sub la prezidanto Chirac, Francio rifuzis subskribi la Interkonsenton.

“La interkonsento, subskribita en Londono la 17an de oktobro 2000, starigas tradukreĝimon por eŭropaj patentoj, kiuj estas malpli kostaj, — notis mallonge la franca registaro, prezentante sian leĝoproponon al la Nacia Asembleo. — Ĝi ne ŝanĝas la statuson de la franca, kiu restas unu el la tri oficialaj lingvoj de la Eŭropa Patentoficejo”. Debato kaj voĉdono okazos verŝajne fine de novembro en la parlamento tute kontrolata de la registara partio. Tio signifas ke la Interkonsento povos ekvalidi en marto 2008.


Landoj, kiuj subskribas la Londonan Interkonsenton, ne plu postulas ke eŭropaj patentoj estu tradukitaj al siaj propraj naciaj lingvoj. Sufiĉos unu el la tri oficialaj lingvoj de la Eŭropa Patentoficejo (EPO) — la angla, la franca aŭ la germana. Efektive tio signifas, ke firmaoj povos elekti nur la anglan. Por esti valida, la Interkonsento devis esti subskribita kaj ratifita de almenaŭ ok landoj inkluzive de Britio, Francio kaj Germanio. Pro tio Francio, sub la prezidanteco de Chirac, malebligis realigon de la Interkonsento dum sep jaroj.

“Se eŭropaj firmaoj povos fari patentojn nur angle, ili ŝparos milionojn da eŭroj jare en patentkostoj”, — klarigas Charlie McCreevy, membro de la Eŭropa Komisiono respondeca pri la interna merkato (kaj do pri patentpolitiko). Li argumentas, ke Eŭropo ne povos konkurenci kun Usono, Japanio kaj Ĉinio sen malpli kosta kaj malpli komplika patento-regularo. En 2005 nur 63 mil 650 eŭropaj patentopetoj estis faritaj, multe malpli ol en Japanio kaj Usono.

La tutangligo de eŭropaj patentoj estos bona novaĵo por burooj de patentadvokatoj, precipe por tiuj en Londono kaj Novjorko. Ili kalkulas, ke ili povos kapti la patentmerkaton en plejparto de Eŭropo. Antaŭe naciaj patentadvokatoj havis klaran rolon por patentigi inventaĵojn en siaj respektivaj landoj kaj lingvoj. Nun anglaj kaj usonaj advokatfirmaoj esperas anstataŭigi ilin per tuteŭropa nurangla servo.

Jacques Myard, deputito el la prezidanta partio UMP, avertas ke francaj firmaoj, kiuj komercas internacie, uzos nur la anglan por patentpetoj. Tiel ili evitos eblajn petojn traduki francajn patentdokumentojn anglan. “De ekonomia vidpunkto, oni ne devas sintrompi: la turno al la tutangleco, kien ni direktiĝas, fariĝos plia handikapo. Ni scias, ke la francoj estas tre malproksime de perfekta kono de la lingvo de Ŝekspiro, precipe kiam temas pri teknikaj esprimoj kun jura subtileco”, — diras Myard. Li ankaŭ dubigas la argumentadon de la registaro, ke malgrandaj francaj firmaoj profitos de la ŝanĝo. Tradukoj, laŭ Myard, reprezentas ĉ. 10% de la totala kosto por seslanda patento valida dum dudek jaroj. La plej grandan parton, ĉirkaŭ 75%, starigas impostoj de diversaj eŭropaj kaj naciaj patentoficejoj.

Ankaŭ deputito Jean-Luc Prével, el la Novcentra Partio, rimarkigas: “Tiun Interkonsenton volis multnaciaj firmaoj por realigi signifan ŝparon. Tamen ĝi maltrankviligas malgrandajn firmaojn, kiuj ne disponas pri interna tradukservo,



Eŭropo pli malofte protektas esploradon per patentoj ol Usono kaj Japanio. (Foto de Eŭropa Aŭdvidservo)

kaj tradukantojn, kiuj timas pri siaj postenoj. La Londona Interkonsento ne ŝajnas korekti la deficiton de Francio rilate al la nombro de patentoj. Tute kontraŭe, ĝi faras la taskon pli malfacila kaj pli kosta por francaj malgrandaj firmaoj”.

Jean-Loup Cuisiniez, proparolanto de la franca grupo “Rajto Labori France” kaj sindikatisto (CFTC), vidas negativajn sekvojn por dungitoj: “Ni vidas la malaperigon de la franca en Francio. Laboristoj frontos instrukciojn en la angla, kiun ili ne majstras, kaj tio kondukos al problemoj de sekureco, al malkulturiĝo kaj suferoj”.

Alian opinion esprimas Laurence Parisot de la franca entreprenasocio MEDEF. Li gratulas la francan registaron pro la “forta signalo” en la teknologia kampo. “En multaj ŝrankoj de francaj malgrandaj entreprenoj estas patentoj ne protektataj internaci-nivele pro tio, ke la tradukkostoj estas tro altaj. Ekde nun, malgrandaj firmaoj povos multobligi la starigon de patentoj”.

Alison Brimelow, la prezidanto de EPO, kontente diras: “Franca ratifado estus tre bonvena, ĉar ĝi permesus la efektivigon de la Londona Interkonsento. Ĝi profitigus la eŭropan ekonomion kaj farus pli alloga la eŭropan patentsistemon por malgrandaj firmaoj. Ĝi ankaŭ profitigus la francan ekonomion, konkurencokapablon kaj novpensadon en Francio”.

Dafydd ab Iago

14 aŭg 2007 forpasis

Russell John Milton (1924–2007)

naskita en Ĉinio, en 1951 li ekloĝis en Finnlando kaj aktive ekpartoprenis la E-vivon kiel kursgvidanto, estrarano kaj kunredaktoro de *Esperanta Finnlando*.

25 de aŭg 2007 forpasis en San-Paŭlo

Elvira Fontes (1916–2007)

instruisto de la franca, Esperanton ŝi lernis en 1960 kaj ekde 1961 instruis ĝin en E-Asocio de San-Paŭlo (EASP) dum 4 jardekoj. Ŝi gvidis televidan E-kurson en la 1970aj jaroj, redaktis semajnan E-rubrikon en *Diario Popular* (1973-1988), prezidis EASF (1974-1983), redaktis *La Lampiron*, verkis du lernolibrojn. Honora Membro de UEA ekde 2000.

26 aŭg 2007 en Necochea forpasis dojeno de la argentina esperantistaro

d-ro Enrique Balech (1912–2007)

oceanologo, honora civitano de Necochea; la unua prezidanto de la Argentina E-Ligo (1941), aŭtoro de la unua argentina *Diccionario Esperanto-Español* (1951), kunlaboranto de *Argentina Esperantisto*, *La Praktiko* kaj *Scienca Revuo*.

Ni funebras kaj kondolencas.



UEA ne okupiĝu pri informa laboro, sed gvidu la edukadon de la informadantoj

Kun plezuro kaj granda interesiĝo mi legis la artikolon de Giorgio Bronzetti, *Nerezignebla renovigo* en *La Ondo de Esperanto* de septembro 2007. Mi esperas ke Bronzetti sendis kopion de sia teksto al la novaj estraranoj de UEA. Ne nur la prezidanto estas konvinkenda pri tiu bezono je renovigo, sed la tuta estraro.

Al mi plaĉis la frazo “Oni alcelu la normalan homon”. Por alceli la normalan homon necesas unuavice ke la personoj, kiuj okupiĝas pri la informado pri Esperanto “normaliĝu”. Nuntempe homoj, kaj precipe intelektuloj, estas ĝenerale pli bone informitaj kaj sekve ankaŭ pli skeptikaj. Sed dum informado multaj aktivuloj, kiujn mi vidis kaj aŭdis, fariĝas sufiĉe fantaziemaj kaj uzas la samajn aŭ similajn argumentojn, kiujn ili aŭdis de siaj prauloj.

Mi jam plurfoje spertis, ke multaj delegitoj de UEA tute ne respondas al leteroj, eĉ se oni, laŭ la regularo, aldonas membromarkfolion. Kaj tamen dum informado ni laŭdas la delegitan reton, kvazaŭ ĝi estas io mirakla, dum ekzistas nuntempe tiom da profesiaj retoj, kiuj funkcias multe pli bone kaj fideinde ol nia kolekto da delegitoj en la jarlibro.

Pro propra sperto mi ankaŭ konstatis, ke en la adreslibro de *Pasporta Servo* troviĝas adresoj de homoj, kiuj ne plu volas akcepti gastojn. Ĉi somere, mi skribis al kvin adresoj en Bulgario kaj ricevis nur unu respondon. Mi jam foje dormis en cirkonstancoj, kiuj ne plu estas tolereblaj en la nuntempa socio, kaj amikoj rakontis similajn spertojn. Sed tiaj adresoj, kiuj povus forpeli novulojn por ĉiam, aperadas denove kaj denove, malgraŭ plendoj. Kaj ĝuste tiu servo ŝajnas iu el la plej fortaj argumentoj, pri kiu informantoj fanfaronas.

Jam okazis ke mi eksentis krampojn en mia ventro, kiam mi aŭdis fervorulon, kiu asertas, ke post kelkaj jaroj Esperanto fariĝos la lingvo de la Eŭropa Unio, dum en tiu sama loko la Esperanto-klubo konsistas el manpleno da maljunuloj, kiuj foje kunvenas en iom obskura kunvenejo. Ĉu tiu fervorulo efektive kredas, ke li kaj lia grupeto ŝanĝos la lingvopolitikon de EU? Per tiu ekzemplo, mi tute ne volas malaprobri la utilan informadon de Eŭroparlamentanoj kaj aliaj politikistoj, sed oni faru tion per trafaj argumentoj.

Ŝajnas al mi evidente, ke “normalaj homoj” pensas, reage al tiaj kredoj: “povraj naivuloj” kaj enpense klasifikas la

Esperantistojn ĉe la revemuloj, kiuj perdis kontakton kun la realo. Same evidentas, ke tiel oni povas varbi nur homojn, kiuj estas facilkredemaj kaj englutas fanfaronajojn senkontrolle.

Kaj tiajn asertojn iuj faras por diskonigi la lingvon, kiu permesus pli bonan komunikadon surbaze de egaleco! Mi foje havas la impreson ke iuj propagandemuloj pensas, ke ili “havas la veron”, dum la neesperantistoj estas stultaj. Sed vera komunikado nur eblas kiam partneroj sentas sin egalvaloraj. Eble multaj Esperantistoj uzas troigojn kaj falsadon por iel kompensi la ĝeneralan nerekonon de la valoro de tiu ĉi lingvo.

Malgraŭ multaj organiza mankoj en la movado, mi tamen trovas ankoraŭ sufiĉe da motivoj por aktivi en ĝi kaj ĉiutage uzi ĝin. Por mi la allogaĵo de Esperanto estas la simpla fakto, ke la kontaktoj kun alilingvanoj pere de Esperanto estas ĝenerale pli riĉaj, pli fluaj kaj precipe pli intimaj kaj amikaj ol tiuj pere de aliaj fremdlingvoj. Se mi, dum informa laboro, parolas de homo al homo, malferme rekonas la organiza malfortojn kaj mankojn en la Esperanto-movado, sed klare priskribas la avantaĝojn por mi, la ŝanco por havi veran kontakton kun “normala homo”, kaj akiri ties simpatian kaj eventuale interesiĝon fariĝos supozeble pli granda ol per la disvastigo de mitoj.

Mi ja konscias, ke en reklamo oni sukcese uzas troigojn kaj trompojn. Sed mi havas du argumentojn por ne imiti tion. Reklamo efikas proporcie al la financaj rimedoj, kiujn ni tute ne havas. Kaj plie, la celo de Esperanto ne estas ludi la ludon de la potenco. Ni ja deziras alternativan lingvuzadon surbaze de egaleco, anstataŭ surbaze de la potenco de nacia aŭ ekonomia superforto.

Mi do samopinias kun Bronzetti ke necesas renovigo de la kontaktoj kun la ekstera mondo. Ne sufiĉas, ke la estraro de UEA estu konvinkita pri tio. Por sukcesi UEA ankaŭ gvidu tiun renovigon. Malforta punkto de la Esperanto-movado estas la manko de organiza iniciato de UEA. Mi kuraĝas formuli jenan sugeston pri informadopolitiko. UEA ne okupiĝu pri informa laboro, sed gvidu la edukadon de la informadantoj. Ekzemple: parto de la gajno de Universalaj Kongresoj estas dediĉita por Propaganda Kaso. Ĝis nun oni uzis tiun monon por plej variaj celoj, sen havi koheran politikon. Oni uzu tiun kapitalon por (re)eduki kiel eble plej multe da personoj, kiuj okupiĝas pri informado. Tio povus okazi pere de seminarioj dum Universalaj Kongresoj. Sed aldone ankaŭ okazu lokaj seminarioj. Ties gvidantoj estu indikitaj de la estraro de UEA por iom post iom akiri koherecon kaj pli da profesieco en la informa politiko. Ĉiuokaze la estraro antaŭvidu la necesan monsumon por tia **konstanta** agado.

Mi konscias, ke facilas verki artikolon kaj lanĉi ideojn. Kiel estrarano pri Informado de 1989 ĝis 1992 mi mem havis eblecon por realigi tiujn ĉi pensojn. Kaj nur parteton de tio, kion mi nun relanĉas, mi sukcesis realigi. Mi do honeste konfesas, ke mi konsideras la taskon, kiun mi tiam akceptis, malsukcesinta!

Feliĉe intertempe aperis *Esperanto sen Mitoj* de Markus Sikosek/Ziko van Dijk, kiu fariĝis furora libro. Kaj ĵus aperis *Informado Praktike* de la sama aŭtoro (du libroj legendaj de ĉiu, kiu okupiĝas pri informa laboro!). Mi nur povas esperi, ke sekve la nuntempa generacio de aktivuloj estas pli konscia pri la bezono je renovigo kaj do, ke la ŝanco ke ĝi realiĝu fariĝis pli granda.

Ivo Durwael (Belgio)

Ĉu ni havas strategion?

En *La Ondo de Esperanto* 8-9/2007 kaptis mian atenton la artikolo de Giorgio Bronzetti *Nerezignebla renovigo*, kiu kritikas la nesufiĉan adaptiĝon de UEA rilate al la moderna mondo kaj novaj teknologioj. Mi metis al mi demandon: kiajn konkretajn paŝojn nia movado preparas por realigi siajn ideojn kiel *informado*, *instruado*, *utiligo*, *levo de prestiĝo*, *demokratio*, *transnacia edukado* ktp., por ke la pozicio de Esperanto estu en la jaro 2017 multe pli favora ol en 2007?

La agoj de esperantistoj donas rezultojn **momentajn** (ekzemple, renkontiĝoj) kaj **daŭrajn** (ekzemple, libroj). La momentaj helpas aktivigi kaj amikigi esperantistojn, la daŭraj puŝas la movadon antaŭen. En 2008 UEA festos sian centjariĝon, sed la membronombro post cent jaroj ankoraŭ ne kreskis. Diferenco kompare kun 1908 tamen ekzistas: la nuntempa Esperanto havas multe pli riĉan literaturon, libran kaj gazetan, beletran kaj fakan, dokumentan kaj turisman, multe pli riĉan vortostokon leksikografie prilaboritan, detale trakomprenitan gramatikon, multajn fakajn terminarojn, multe pli riĉan oferton de turismaj aranĝoj kaj de reta korespondado kaj en la interreto kreskas virtuala Esperantujo, tage kaj nokte disponebla al miloj da uzantoj kaj milionoj da scivolemuloj.

Ĝuste tiuj scivolemuloj juĝas la forton kaj signifon de Esperanto laŭ tio, kion ili trovas en la reto. La “mileniuloj” (gejunuloj naskiĝintaj post 1982, kiuj atingis plenaĝecon en la milenia jaro) jam preferas elektronikajn fontojn antaŭ la fontoj paperaj kaj tiu tendenco verŝajne ankoraŭ kreskos en la futuro. Esperanto-uzantoj apenaŭ multiĝos, se interesatoj ne trovos en la reto sufiĉe da aplikoj de la studota lingvo. Nun plejparto de novaj varbitoj forkuras, post kiam ili konstatas, ke la lernitaĵon ili ne povas utiligi.

Fremdajn lingvojn oni lernas ne nur por komunikado, sed ankaŭ por akirado de informoj. La interreto estas fakte tutmonda enciklopedio, en kiu oni povas ricevi informojn preskaŭ pri ĉio ajn imagebla, en diversaj lingvoj, precipe en la angla. Esperanto fariĝos por la retanoj interesa lingvo tiam, kiam ankaŭ en ĝi estos troveblaj valoraj sciaĵoj.

En 2005 la Eŭropa Komisiono publikigis alvokon, ke oni kreu en la interreto diĝitajn bibliotekojn en ĉiuj lingvoj, por konservi kaj disponigi al la vasta publiko la kulturen heredaĵon de ĉiuj nacioj. La alvoko supozas, ke en la reto aperos milionoj da libroj (kompreneble ne plu blokataj de aŭtoraj rajtoj) kaj ankaŭ bildoj, fotoj, filmoj, sonoj, simple ĉio enkomputiligebla. Universitatoj jam enkondukas la konstruadon de elektronikaj bibliotekoj kiel novan studobjekton.

Speciale gravaj ili estas por Esperanto, ĉar niaj “paperaj” bibliotekoj ne troviĝas en ĉiu vilaĝo, eĉ ne en ĉiu granda urbo, sekve plejparto de nia kulturo estas por esperantistoj (ne nur por novuloj) neatingebla, kvazaŭ ĝi ne ekzistus. La interreto povas revenigi al la legantoj la malnovan literaturon, kaŝitan en niaj muzeoj, kaj povas fari ankoraŭ multe pli. Ekzemple:



— Krei esperantlingvan sistemon de turismaj informoj pri ĉiuj landoj, urboj, vilaĝoj, pri iliaj vidindaĵoj kaj eminentuloj.

— Prilabori ĝeneralan enciklopedion pri ĉiuj scioj de la homaro kaj samtempe aktualigi kaj kompletigi la *Enciklopedion de Esperanto* el 1935.

— Verki legolibrojn de la ĉefaj fakoj kiel tekniko, elektroniko, kemio, medicino, agrikulturo, per kiuj la studentoj povus ensorbi la ĉefajn esperantlingvajn fakajn terminojn.

— Traduki ĉiujn ekzistantajn terminarojn al la naciaj lingvoj de niaj landaj asocioj, por ke en la tuta Esperantujo estu uzata la sama termino por la sama nocio.

— Ellaboradi novajn terminarojn kaj tuj ilin tradukigi al la ceteraj lingvoj.

— Prepari en ĉiuj lingvoj grandajn ĝeneralajn vortarojn kaj ankaŭ fakajn.

— Prezenti nian originalan literaturon kaj silentigi mokantojn, ke Esperanto estas lingvo sen propra kulturo.

— Prilabori manuskriptojn de niaj forpasintaj literaturistoj kaj aliajn heredaĵojn.

— Instrui aliajn lingvojn kaj studobjektojn pere de Esperanto.

Multo jam estas farita. Kelkaj miloj da beletraj kaj fakaj esperantlingvaj tekstoj, eĉ tutaj libroj, nun troveblas en la reto. En la reta enciklopedio *Vikipedio* aperas apud ĝeneralaj temoj ankaŭ turismaj informoj, biografietoj de gravaj esperantistoj kaj aliaj informoj pri la movado. Kursoj, vortaroj, terminaroj, fotoj, muzikaĵoj, videoj, babilejoj ne mankas.

Tamen ĉio kreskas sovaĝe, nesisteme, laŭ personaj gustoj de entuziasmaj privatuloj. Multaj laboroj eĉ perdiĝas, ĉar ili estas dissemataj tra la tuta planedo kaj dependas de unuopuloj. Mankas oficiala tutmovada pilota projekto, al kiu la retanoj povus sendi siajn laboraĵojn por konservado kaj por envicigo en komunan sistemon. Mankas movada arkivo de elektronikaj materialoj. En 2017 la virtuala Esperantujo sendube proponos al interesatoj riĉan sortimenton, sed estas demando, ĉu nur kiel pelmelon de duonbakitaĵoj fare de unuopuloj, aŭ **ankaŭ** kiel sisteme konstruitan institucion de UEA.

Miroslav Malovec (Ĉeĥio)



Malgraŭ provlegado kaj aliaj ekzorcaj rimedoj, la redakcia koboldo plu kunlaboras en nia revuo. Lian septembran kontribuon vidu en la paĝo 16a — tie anstataŭ la foto de **Elmir dos Santos Lima** estas foto de **Fabiano Henrique**, kiu verkis la artikolon. Vidu supre la ĝustan foton.

Por realismaj argumentoj

En *La Ondo* №8–9 Giorgio Bronzetti postulas renovigon de UEA. Mi legis tiun artikolon kun granda intereso kaj principe samopinias. Tamen ni ne akuzu Renato Corsetti, kiu faris multe por vigligi la movadon. Li tre agadis sur la baza nivelo kaj eble malpli sur la strategia, kvankam li prezentis strategian planon, kiu por mi estis bona metodiko. Ĉiu prezidanto havas sian stilon. Siatempe Tonkin lanĉis strategian planon, sed post lia foriro el la estraro ĝi estis forgesita.

Ankaŭ mi opinias, ke oni ne argumentu nur idealisme. Mi havas penon diri al neesperantistoj, ke Esperanto plibonigas la mondon. Plibonigantoj de la mondo estas suspektindaj, bedaŭrinde. Mi preferas realismajn argumentojn, ekzemple la maljustecon de la internacia lingva ordo, la nepre necesan simpligon de la komunikado por ŝpari energion kaj monon, ktp. La internacia lingvoproblemo ekzistas, spite de la vasta uzado de la angla lingvo, ja ĝi akriĝas pro la tutmondiĝo.

Mi iom dubas, ke Probal Dasgupta provos kaj povos renovigi UEA. Ĉu li ne staras kun unu kruro en Ebura Turo? Sed entute kion povas fari honorofica prezidanto, honorofica estraro? Ankaŭ tiurilate ni estu realistoj. Post unu jaro ni scios pli.

Bruno Graf (Svislando)

La nova prezidanto: ĉu “leader”

La fina frazo de la artikolo de Giorgio Bronzetti (“Laŭ mi estas tempo por renovigo kaj por prezidanto pli entreprenema”) estas certe skribita antaŭ la Universala Kongreso en Jokohamo.

Mi dum la solena fermo same pensis kaj vane serĉis en mi la fajron, kiun iamaj kongresoj postlasis en mi. Burokrateca podio, kiu eĉ ne bone estis gvidata, ĉar la nova prezidanto tute publike montriĝis malkapabla esti tia, kia kaŝiĝas sub la angla nocio **leader**. Mi kredas, ke ne troviĝas taŭga traduko en Esperanto, sed certe multaj legantoj komprenas la karakterizajn trajtojn de tia gvidanto, kia forkondukas homojn al celoj, kia atingas la korojn kaj flamigas ilin. Tia, ankaŭ nia nova prezidanto ŝajne ne estas. Tio malpotencigas la movadon kaj lamigas la emon aktivi. Unue li alvokis al harmonio. Bone, bone! Sed kiucele? Ĉu li ne volas batali kontraŭ lameco, burokrateco, fermiteco kaj stagnado de nia movado?

Ne plu estas granda personaro, kiun li devus movi. Sed tiu personaro indas havi bataleman prezidanton, kiu forpelas la rezignemon, kiu denove malfermas pordojn al la mondo, kiu ŝajne forgesis nin.

Kie restas la salutoj de UN kaj UNESCO? Kie restas la ĵurnalistoj? Kial la scienca vivo pere de Esperanto okazas sen surlokaj sciencistoj? Kial eĉ la Oratora Konkurso dronas sub amatoreca gvido? Kie restis la kriterioj por la juĝoj, ĉu entute ekzistis kriterioj? Kial la ĵurio ne estis antaŭe prezentita? Kial oni ne partoprenigas la aŭskultantaron kundecidi? Ktp, ktp. Pri la trompa, multekosta bankedo mi eĉ ne volas paroli. Ne estis grandaj la okcidentaj stomakoj. Estis la troa vendado de enirbiletoj! Mi do sentas la neceson por tre urĝa renovigo de nia plej ĉefa organizo UEA. Sed tiu devas komenci per estraro, kiu reprezentas la ecojn de **leader**. Tian estraron mi ankaŭ ĉi-jare ne vidas.

Prof. d-ro Hans Eichhorn (Germanio)
membro de UEA depost 1963
gajninto de Oratora Konkurso 1969 ktp

Problemoj en TEJO

Ĉi-somere en la 63a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Hanojo devus esti elektitaj novaj estraro kaj prezidanto de TEJO. Sed pro manko de la kvorumo, la Komitato de TEJO ne povis fari laŭstatutajn elektojn. Unu monaton post IJK-63 la prezidanto de TEJO, David-Emil Wickström, anoncis sian demision “pro laboraj kaj familiaj kialoj”.



Haris Subašić havas multajn priprensindajn aferojn

La nova prezidanto, Haris Subašić, naskiĝis 28 mar 1981. Li loĝas en Bosnio kaj Hercegovino kaj estas studento pri komputiko kaj ekonomiko, programisto, instruisto. En la nuna estraro restas Chuck Smith (informado, UEA-rilatoj), François Hounsounou (landa agado, ILEI-rilatoj), Katja Ignatieva (kasistino), Valentina Sidorova (ĝenerala sekretario).

La elekto de la nova estraro eble okazos ĉi-jarfine. Sed la malnova estraro ankoraŭ devus decidi, kie okazos IJK-64. Haris Subašić afable konsentis respondi pri tio.

Kie okazos la 64a IJK? – Pri tio mi ankoraŭ ne povas diri iom pli, pro la konfidenco kaj egaleco inter kandidatoj. Jam anonciĝis 2–3 kandidatoj, sed ni atendas ke aliaj sendos dokumentojn antaŭ la 15a de septembro. La kutima limdato estas la 15a de decembro, sed nun temas pri dua rondo.

Kiam la kongres-urbo estos elektita? – Ni esperas havi ĉiujn dokumentojn de ĉiuj kandidatoj meze de septembro, tiel ke la estraro povu decidi ĝis la fino de la monato.

Kiuj proponoj venis por la 65a IJK? – La limdato por ricevi proponojn por 2009 estas la 15a de decembro 2007. Ĝis tiam estas nur ideoj, interesitoj kaj aludoj. Nuntempe pli gravas interkonsenti kaj finplani la 64an IJK, kaj poste ni rigardos iom pli antaŭen.

AIKO

Heroldo pirate eldonata?

Kun tristo mi legis la rilatigon de la nomo de mia forpasinta edzino Ada, honora membro de UEA, kun tiu de la nun pirate eldonata *Heroldo*. Tiu ĉi lasta gazeto havas nenion komunan kun la antaŭa samnoma gazeto, tiama “organo de la Esperanto-Movado”, kiun Ada redaktis dum 34 jaroj.

La nuna gazeto perfidis la antaŭan 70-jaran tradicion de neŭtraleco kaj lojaleco al la Esperanto-Movado. Ĝi fariĝis eldonaĵo de politik-tendenca malgranda sekto, kiu subfosas nian organizitan movadon (UEA-n, ĝiajn aliĝintajn kaj kunlaborantajn asociojn), batalas kontraŭ la penado venkigi Esperanton, ĝojas pro la malsukcesoj de esperantistoj, ridindigas la Universalajn Kongresojn (difinitajn “nur ĉarmaj turismaj aranĝoj”), semas polemikojn, kverelojn, personajn vengojn, malpacon en niaj vicaj kaj senĉese atakadas per mensogoj veteranojn kaj valorajn esperantistojn. Tiu sekto senhalte laŭdadas sin mem kaj estas tute izolita.

Por ricevi kopion de la originalaj dokumentoj pri la kapero de la tradicia *Heroldo* fare de Valerio Ari (tiu estas lia sola vera nomo, sed li uzas nur multajn falsajn nomojn kiel Giorgio Silfer, Vanov, HoKo ktp) skribu al mi: giancarlo.fighiera@libero.it

Gian Carlo Fighiera (Italio)
honora membro de UEA

Evitema — pretertema

La respondo de Bertilo Wennergren (*LOdE*, 2007, №7, pĝ. 12–13) al mia artikoleto *Oficialaj Aldonoj — la vivanta lingvo fajfas pri tio* estas mult-rilate pretertema kaj evitema kaj la aserto pri “pluraj malĝustaĵoj” senbaza.

1) Mi ne nomis la Akademion “grupeto de anonimuloj”, sed la voĉ-donintojn pri la 9a OA kies konkretan sintenon oni sekretigis. Cetere, mi kontestas kiun ajn aŭtoriton de la t.n. Akademio de Esperanto, kiu jure ne ekzistas kaj sociologie estas nura svagaĵo.

2) Mi referencas al la artikolo de G. Waringhien “Inventaro de la fundamenta kaj oficiala vorttrezoro” (*Scienca Revuo*, 1955, pĝ. 137–143) kiu elmontras tre klare la kaosan kaj sensisteman laboron de la Akademio... antaŭ la wengerena epoko.

Mi vetas ĉiun sumon, ke la nunaj membroj de la Akademio apenaŭ ion scias pri la zigzagaj vojoj de nia vort-materialo, ties UV- aŭ OA-aparteno, ties sido aŭ malsido ekster la UV-alfabeto ktp., des men pri la abunda esperantologia literaturo ĉi-tema. Mi mem disponigis al Wennergren du OA, kies tekstojn li ne posedis. Mi tute ne skribis pri la erareco de PIV, sed tiu de UV kaj OA kaj diris, ke io erara postulas korekton. Ne pli. Eraroj ne povas postuli aŭtoritatecon.

4) Restas fakto, ke *etno* troviĝas en la 9a OA kaj estas uzata en la difino de *eŭfemismo*. Ĉu ĝi estis “kandidatovorto” aŭ ne, interesas jam neniun. Kio estas pri *etnografio*, *etnologia* ktp?

5) Pri la “oficialeco” de *-io* mi eraris. Pro ties vasta uzateco (tiel grava kriterio por B.W.) mi missupozis tion. Plia pruvo, kiel la Akademio postlumas la efektivan lingvo-uzon. Cetere, se *-io* oficialiĝos, tio malfermos la pordon al aliaj duoblaĵoj...

6) De kie B.W. prenas, ke *kaki* estas malpli uzata ol *pisi*? Li diras: “Multaj Esperantistoj (= esperantistoj) [...] eĉ ne scias pri ĝia ekzisto.” Kia kriterio! Kion mi ne scias, tion mi ne envidas. Kaj kiaj “esperantistoj”, se konsideri, ke de 1905 “esperantisto estas nomata persono kiu scias kaj uzas Esperanton”. Ĉu la kriterio estas la eternaj komencantoj kaj bonantaguloj?

7) Al *vodko* k.c. mi revenos en aparta artikoleto *Aliaj landoj, aliaj brandoj*.

8) Mi diris, ke la vivanta lingvo fajfas pri la maroto de OA, sed ne ke mi “tiom (= tiel) forte kontraŭas verkadon de vortaro”. Tute male: ni bezonas bonajn kaj detalajn vortarojn, ne fuŝajn kaj ftizajn. La nova vortaro de Krause (germana-esperanta) ne estas bona, la OA ne estas vortaro, sed nuraj vort-listoj, kiuj eĉ en sia sumo ne formas vortaron.

9) Pri la arbitra uzo de la ligo-streko B.W. silentas, same pri tio, kial li diras Pollando kaj ne Polujo, Rusujo kaj ne Ruslando. Ĉu do Danujo kaj Svisujo aŭ Danlando kaj Svislando?

Reinhard Haupenthal

Novaj gvidantoj de la Akademio

Estraranoj: John Wells, prezidanto; Probal Dasgupta, vicprezidanto; Brian Moon, vicprezidanto; Renato Corsetti, sekretario.

Direktoroj: Marc Bavant, Faka Lingvo; Jouko Lindstedt, Gramatiko; Bertilo Wennergren, Ĝenerala Vortaro; Marc Bavant, Kontrolado de lerniloj; Boris Kolker, Lingva Konsultejo; Humphrey Tonkin, Literaturo; Probal Dasgupta, Prononco; Carlo Minnaja, Komisiono Historio de AdE.

Laŭ *Oficialaj Informoj*, №10, 14 sep 2007

Malgravaj kaj malinteresaj detaloj

En *Evitema — pretertema* Reinhard Haupenthal pluparolas pri vico da detaloj, kiuj plejparte estas malgravaj kaj malinteresaj: uzo de ligostrekoj, elekto inter “Pollando” kaj “Polujo” (ambaŭ ĝustaj kompreneble), k.t.p. Pliaj komentoj pri tio de mia flanko ŝajnas superfluaĵoj.

Kion Haupenthal celis per “grupeto de anonimuloj”, tion mi miskomprenis. Efektive ne estis facile ĝuste kompreni. Estas tute prave, ke ne estas sciate, kiuj el la voĉdonintoj pri 9OA voĉdonis jese pri tiu aŭ jena vorto. Eĉ la Akademio mem ne scias, ĉar la voĉdonado estis sekreta. Povas esti, ke estonte tiaj voĉdonadoj okazos malsekrete. Ĉiukaze pri la decidoj respondecas la tuta Akademio, ne la unuopaj membroj, kiuj voĉdonis jese.

Bertilo Wennergren

Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro

Spirhaltiga libro

13 sep 2007 en la reta dissendolisto *UEA-membroj* aperis jena komento de **Roy McCoy** el Roterdamo:

Mi ĵus preterpasis kelkajn stakojn da nove alvenintaj libroj en la UEA-Libroservo — tute kutima okazaĵo, tamen mi estis aparte kaptita de tiuj ĉi, kaj haltis momente por rigardi. “La Mastro de l’ Ringoj”, — mi legis. “Ĝi estis elĉerpita, kaj nun iu reeldonis ĝin?” — mi konfirmipetis de Ionel Oneț kiu sidis ĉe sia normala laborloko. Li respondis ke jes, kaj mi plu rigardis.

Temis pri ne unu sed ĉiuj tri volumoj de tiu verko, kunigitaj de larĝa, egale bele presita kartona rubando. Tio ĉi ne estas nur la plej bona Esperanta eldonaĵo kiun mi estas de longa tempo vidinta, ĝi estas unu el la plej belaj aferoj kiujn mi ie/iam ajn vidis. Iom ŝokite, mi demandis al Ionel: “Kiu faris tion?” Mia unua suspektato estis Petro Chrdle, pro la kovrila beleco — sed ne, Ionel diris: “Korĵenkov.” Gratulegon do al li. Mi evidente ne estas senvorta, sed vortoj tamen ne komunikas la impresegan kvaliton de tiu ĉi eldonaĵo. Ĝi haltigas spiradon.

Dankon al Roy pro la gratulego, sed pli ol mi, nur kunordiganto de la projekto *Tolkien en Esperanto*, ĝin meritas:

Brian Drake, **Andreas Emmerich**, **William Harmon** pro la atenta provlegado;

Halina Gorecka pro la korektado kaj pro la pacienco;

Bertilo Wennergren pro traduko de du aldonaj tekstoj;

Hoss Firooznia, **Edmundo Grimley Evans**, **Aleksandr Osokin** pro valoraj konsiloj kaj proponoj;

FAME-Fondaĵo kaj **nia anonima amiko** pro senintereza prunto;

Vladimiras Beresniovos pro la arte farita kovrilo;

Povilas Jegorovas, **Zenonas Sabalys**, **Juratė Pupšaitė** pro la helpo en presado kaj ekspedo;

Libroservoj, kiuj kuraĝe antaŭmendis;

kaj plej grave: **John Ronald Reuel Tolkien** kaj **William Auld**, sen kiuj ni ne havus la libron kiu, laŭ Roy, estas “unu el la plej belaj aferoj kiujn mi ie/iam ajn vidis”.

AIKO

Naŭa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro (3)

frustr/i. Senigi je kontentigo de bezono aŭ deziro (tiel kaŭzante malagrablajn sentojn): *la malhelpoj frustris ŝin; li sentas sin frustrita.*

furz/i. Lasi eliri intestajn gasojn el la anuso, kutime kun malagrabla odoro, ofte kun bruo: *la ebrulo senhonte furzis.*

galaksi/o. Stelamaso (konsistanta tipe el inter milionoj kaj centoj da miliardoj da steloj) plej ofte aspektanta kiel spirala aŭ elipsa nebula astro: *nian galaksion oni nomas "la Lakta Vojo" aŭ simple "la Galaksio".*

gen/o. Kromosomero, kiu regas biologian heredadon.

genr/o 1 Gramatika kategorio (precipe ĉe substantivoj kaj pronomoj, sed ankaŭ ĉe aliaj vortspecoj), kiu almenaŭ historie iel rilatas al la sekso de estaĵoj aŭ al distingo inter uloj kaj aĵoj: *vira genro; ina genro; neŭtra genro.* **2** Subgrupo de zoologia aŭ botanika familio.

giĉet/o 1 Fenestreto en pordo aŭ vando destinita por interparoli aŭ transdoni ion. **2** Apartigita spaco, en kiu oni priservas klientojn (en poŝtoŝicejo, biletvendejo k.s.), ordinare kun ia barilo (fenestreto, vendotablo k.s.) inter la giĉetisto kaj la kliento.

glis/i (pri aviadilo) Flugi (malsupren) sen uzo de motora forto: *la aviadilo malrapide glisis al la tero.* **glis/ il/o.** Senmotora aviadilo, kies flugado dependas de aerfortoj kaj aerfluo.

grafik/o. Arto aŭ tekniko prezenti ion per desegnaj linioj: *ŝi studis grafikon en la artlernejo; komputila grafiko estas nun populara.* **grafik/aĵ/o 1** Bildo grafika: *grafikaĵoj ilustris la poemaron.* **2** Desegnaĵo prezentanta fenomenojn aŭ abstraktajn rilatojn per kurboj, surfacoj k.s., ofte kun nombraj indikoj: *la grafikaĵo prezentis la dividon de la membraro laŭ profesioj.* **grafik/ist/o.** Grafika artisto; profesiulo pri grafiko.

gujav/o. Frukto de gujavujo, tre aroma, ronda aŭ longforma, ruĝe aŭ flave verda, pomo-granda, uzata por konfitaĵo ktp. **gujav/uj/o, gujav/arb/o.** Arbo el tropika Ameriko, kreskigata pro sia frukto gujavo. (*Psidium guajava*.)

hormon/o 1 Substanco produktata de organo (ofte de glando), portata de la sango al aliaj organoj aŭ ĉeloj por influ ties funkciadon. **2** Substanco en vegetaĵo, funkcia analoge al hormono *1*

ADE

(plej ofte influanta la kreskadon de la vegetaĵo).

ideologi/o. Idearo. Sistemigita aro da ideoj kaj idealoj de grupo politika, religia, socia k.s., tra kiuj la grupanoj rigardas la realon.

iks/o. La litero X, x.

inflaci/o. Ĝenerala plialtiĝo de prezoj kaj malpliigo de la aĉetpovo de mono.

insulin/o. Hormono produktata en la pankreataj insuletoj, influanta la uzon de glukozo en la korpo, kaj uzata kiel rimedo kontraŭ diabeto.

ipsilon/o. La litero Y, y.

Israel/o. Ŝtato en okcidenta Azio, ĉe Mediteraneo, sude de Libano, fondita en 1948. Internacia landokodaĵo: IL.

[Noto. Kromnomo por Jakob estis *Izrael(o)*, laŭ kiu oni nomas la antikvan popolon *Izrael(o)* aŭ la antikvajn hebreaĵojn *Izraelidoj*, ekzemple en la Esperanta Biblio.]

japan/o 1 Ano de la ĉefgento de Japanujo. **2** (vastasence) Japanujano. **Japan/uj/o.** Lando en orienta Azio, insuloĉeno inter Pacifiko kaj la Japana Maro. Internacia landokodaĵo: JP.

ĵaz/o. Muzikspeco kreita en la 1920aj jaroj en suda Usono, karakterizata ĉefe de improvizado kaj de sinkopa ritmo.

ĵoke/o. Rajdisto en ĉevalaj vetkuroj.

ĵud/o. Luktosporto dupersona, origine el Japanujo, en kiu oni provas faligi la kontraŭulon per specialaj ĵetoj, kruroblokadoj k.s.

kalci/o. Ĥemia elemento, grizblanka metalo, kiu interalie estas parto de ostoj kaj dentoj. Simbolo Ca, atomnumero 20, atommaso 40,08.

kampanj/o 1 Serio da militaj manovroj kun difinita celo en iu regiono: *la Ruslanda kampanjo de la Granda Armeo en la jaro 1812a.* **2** Intensa publika agado por akiri subtenon de homoj por afero: *la mediprotektantoj faris kampanjon por reutiligo de rubaĵoj; elekta kampanjo.* **kampanj/i.** Fari kampanjon: *ili kampanjis por la*

maldekstra partio; li kampanjas kontraŭ la nova leĝo.

kancer/o. Grava malsano karakterizata de malnormala kaj danĝera multobliĝo de ĉeloj: *pulmokancero; mamokancero.*

kanguru/o. Aŭstralia mamulo, kiu havas tre mallongajn antaŭajn krurojn, tre longajn kaj fortajn malantaŭajn krurojn, per kiuj ĝi sin movas salte, kaj tre muskolan apogan voston, kaj kies ino havas ventran haŭtpoŝon, en kiu restas la idoj dum la unua tempo post la naskiĝo. (*Macropodinae* aŭ pli vastasence *Macropodidae*.)

kapsik/o 1 Kreskaĵo, kiu produktas kapsikon *2.* (*Capsicum*.) **2** Verda, ruĝa aŭ flava longforma frukto de kapsiko *1*, kun multaj semoj pendantaj interne, uzata kiel legomo kaj kiel spico: *akra kapsiko; neakra kapsiko; el kapsiko oni faras paprikon.* **kapsik/et/o.** Malgranda ordinare tre akra kapsiko *2.*

karoseri/o. Ekstera (supra) korpo de aŭto aŭ de simila veturilo, kontraste al eventuala ĉasio: *mempportanta karoserio* (= karoserio sen ĉasio).

kased/o. Speciala skatoleto, kiu enhavas kaj protektas sonbendon, filmon aŭ ion similan, kaj kiun oni povas, sen ĝin malfermi, meti en aparaton por uzi tiun enhavaĵon.

katapult/o 1 Malnova militmaŝino, kiu pafis ŝtonojn k.a. pere de longa streĉita brako aŭ pere de diversaj aliaj meĥanismoj. **2** Pafileto en la formo de Y, kun kaŭĉuka ŝnuro (rubando), per kiu oni (precipe infanoj) pafas ŝtonetojn k.s. **3** Meĥanika aparato, por antaŭenĵeti aviadilon for de la ferdeko de ŝipo, aŭ glisilon for de la grundo.

kibuc/o. Speco de kooperativa vilaĝo Israela kun komuna havaĵo.

kimon/o. Japana tradicia vesto longa kun larĝaj manikoj, portata kun larĝa zono el ŝtofo.

kiosk/o 1 Budeto por vendo de varoj (gazetoj, floroj, trinkaĵoj ktp.). **2** Ĝardeno (Orient-stila) paviloneto nefermita ĉe unu aŭ pluraj flankoj.

klitor/o. Malgranda sentema organo ĉe la antaŭo de la vulvo, grava en seksa plezuro ĉe virinoj.

klon/o. Organismo aŭ ĉelo, kiu estas gena kopio de alia organismo aŭ ĉelo. **klon/i.** Estigi klonon (el organismo/ĉelo); estigi kiel klonon: *kloni beston; kloni ĉelon.*

Daŭrigota

Poemoj de Aleksandr Sumarokov

En la julia *Ondo* per poemoj de Lomonosov, ni komencis la ciklon *Rusa Antologio*, kiu celas konatigi la Esperantan legantaron kun la rusa poezio. La dua paĝo de nia *Antologio* estas dediĉita al Aleksandr Petróviĉ Sumarókov (1718–1777), unu el la kunfondintoj de la rusa klasikismo. Sed dum Lomonosov famiĝis per odoj, la kreado de Sumarokov estis pli vast-gama.

Li verkis la unuajn rusajn tragediojn (entute, naŭ), pro kiuj li ricevis la kromnomon “la norda Racino”, dek du komediojn, dek satirojn, pli ol tricent fablojn, multajn epigramojn, cent kvindek amkanzonojn, plurajn eklogojn kaj la unuajn rusajn elegiojn.

La vorto “unua” ne estas evitebla en prezento de Sumarokov. En 1756 li iĝis la unua direktoro de la Ruslanda Teatro, kaj en 1759 li fondis la unuan privatan ruslandan revuon *Trudoljubivaja pĉela* (Laborema abelo), kiu estis ankaŭ la unua literatura revuo en la rusa lingvo. Ne estis lia kulpo, ke nur kvin jarojn li direktis la teatron, kaj ke nur unu jaron la *Abelo* zumis...

Krome, li profundigis la rusan poetikon, aldonis al la Lomonosova “ŝtata sublimo” simplecon, naturecon kaj klarecon de la poezia lingvo, kaj riĉigis la rusan poezion per pliaj metrikaj rimedoj.

Sed por ni hodiaŭ li estas rusa poeto.



AIKO

STRIGO KAJ RIMULO

Ekfanfaronis Strig’.

La sango bolis pro fier’, malic’ konstantis.

Jen liaj vortoj por instig’:

*“Unua inter birdoj mi ĉi-boske kantis,
Sed nun pro tio mi — kun mia vana plor’ —*

Post kantoj estas el la bosk’ ĵetita for:

Pro dolĉa voĉo mi dolorojn suferantis”.

Respondis al la Strigo iu Versplektant’,

Rimul’ de ĉia vant’:

*“Frateto! Saman mi honoron ja akiris,
Ke la unua en la urb’ per rimoj ekdeliris.”*

VULPO KAJ DORNARBUSTO

Jen staris Dornarbust’.

La Vulp’ friponi kutimiĝis,

Kaj plej spertiĝis.

Sciencon de ŝtelado regas li kun ĝust’.

Samkiel filo hunda

Sciencon pri forbar’,

Aŭ oficulo sen honest’ profunda.

Allogas Vulpon dolĉaj beroj sur branĉar’,

Kaj provas kapti li branĉetojn man-etende —

Samkiel oficist’ al koruptaĵ’ pretende.

L’ Arbusto plene

Provizis sin kaj bere, kaj alene,

Kaj pikas. Vulp’ koleras multe,

Ke liaj provoj fiaskadas senrezulte.

La Vulpo diras al Arbusto: “Ho kanajl’!

Vi min pikadas pro malico, kvazaŭ najl’”.

Respondis la arbust’: “Insulto ne efikas:

Ne mi vin pikas, vidu, sed vi mem vin pikas.”

Legant’! Ĉu scias vi, por kio mia dir’?

Tielas Dornarbust’, tutsamas la satir’.

EPIGRAMOJ

*Ŝi forte amas vin, kaj vin obeas ŝi,
Sed estas tridekop’ — ŝi ilin amas pli.*

*Ŝi estas via nun, sed ja ne por ĉiam’:
Dum ne renkontis homon, indan je la am’.*

*Tutkore amas mi, kaj brulas en pasi’,
Nur tamen ne al vi.*

*Milon’ por longe de l’ edzino forveturis,
Sed por adiaŭ diri, baldaŭ reen kuris.
Eĉ ne supozis ŝi en tristo kaj angor’,
Ke li revenos hejmen post nelonga hor’,
Tri horoj je semajn’ impresis ŝin subite,
Kaj pro sopir’ — alian ŝi akceptis lite.
Vidinte l’gaston, la veninto preskaŭ svenis.
L’ edzino kriis: “Edzo, kio vin ĉagrenis?
Pasiojn bridu vi kaj regu vin sentime:
Kun li mi korpe estas, sed kun vi anime.”*

*Vidvino plendis pri ofendo de l’ honor’,
Sed sciis la juĝist’ pri vera ŝia mor’.
Demandis: “Kiel?” — “Ĉe najbar’ en tago nuna, —
Rakontis ŝi, — okazis babilado kuna.
Gastin’ mensogis tie krude, en maldec’,
Ke mi kvar idojn kvazaŭ naskis dum vidvec’.”
Juĝisto diris do: “Neglektu ĉi malbonon;
Jen tia mondo, ĉiam plusas ĝi duonon”.*

GLORO

*Homo, rememoru plu,
Ke nelongas vivo-flu’.
Forpasos la riĉec’, amuzo kaj honoro,
Kaj restos en la mondo sole via gloro.*

Tradukis el la rusa Valentin Melnikov



Donaci la reton

Goes, Heidi. *Afero de espero: Konciza historio de la Esperanto-movado en Afriko*. — Rotterdam: UEA, 2007. — 86 pĝ., il.

Verdire la nigra kontinento, el vidpunkto de evoluo de Esperanto, por la eŭropanoj ĉiam estis “blanka makulo” t.e. “terra incognita”. La makulon forviŝis Heidi Goes per sia konciza libreto. En la libro estas prezentitaj dekoj da afrikaj landoj en kiuj ĝermis Esperanto-movado. La sekaj tekstoj bone kompletigas fotoj de la aktivuloj kaj titolpaĝoj de la unuaj Esperanto-periodaĵoj.

Trafoliumante paĝojn de *La Esperantisto*, ni trovas la unuan mencion pri la unua esperantisto en Afriko. En *La Esperantisto* (1890, №11, pĝ. 55) en la rubriko *Respondoj al la amikoj* ni legas:

Al s-ro C. en Cape-Town (Suda Afriko). Per poŝta karto mi siatempe respondis al Vi je Via letero, sed post kelka tempo la poŝto redonis al mi la karton kun la surskribo, ke por Via lando poŝtaj kartoj ne estas akceptataj. Tiam mi sendis al Vi jam leteron kovritan kaj mi petas Vin sciigi min, ĉu Vi ĝin ricevis.

Bedaŭrinde, ni ne scias kiu li/ŝi estis. En la sama fonto estas ankoraŭ unu-du mencioj pri afrikaj esperantistoj. Kvankam *La Esperantisto* ne estis sur la labortablo de Heidi Goes, li faris grandegan laboron; li, mi dirus, verkis “Koncizan Enciklopedion de la Esperanto-movado en Afriko”!

La verko prezentas informojn ekde la izolitaj esperantistoj ĝis la Afrikaj Esperanto-Kongresoj. Afriko postiras laŭ itinero kiun trairis eŭropaj esperantistoj antaŭ 80 jaroj. Tiam la eŭropanojn neniu helpis. Hodiaŭ ni povas helpi niajn samideanojn en Afriko. Kiel? Sufiĉas okazigi UK en iu el la afrikaj landoj. Ja ĉiuj scias, ke UK-oj plivigliĝas Esperanto-movadon en la kongres-lando. Ekzemple kiam UK en 1986 okazis en Pekino, en 1987 (en la jubilea jaro) 500 mil ĉinaj lernantoj ekstudis Esperanton! Tian eksplodan efikon ni ne havos en Afriko, sed se 500 aktivaj esperantistoj venos al la afrikaj Esperanto-vicoj, ni povus taksii la rezulton bela kaj kontentiga.

Estas konata proverbo: “Se vi volas helpi solulon, donacu fiŝon; se vi volas helpi al la tuta vilaĝo, donacu fiŝkaptan reton”. Ni devas donaci la reton.

Anatolo Sidorov

Instrui internacian lingvon per universala metodo

Manlibro pri instruado de Esperanto / Red. Katalin Kováts. — Represo de la 2a eld., korektita. — Hago: ILEI, Partizánske: Espero, 2006. — 152 pĝ., il. — 300 ekz.

La recenzata *Manlibro* kreiĝis kadre de “Flugiloj de Malfacila Vento”, projekto por plivastigi kaj subteni inter la junuloj instruadon de Esperanto. Kováts starigas la celojn de la libro:

«plibonigi organizadon kaj gvidadon de Esperanto-kursoj per trejnseminarioj, manlibro kaj starigo de kontaktreto/komunumo; altigi la lingvonivelon de junaj Esperanto-parolantoj per perfektigaj kursoj kaj ekzamenoj; iom post iom grandigi la nombron de junaj Esperanto-parolantoj per kursoj, nova materialo kaj “multobliga efiko”».

En la unua ĉapitro pri celoj de lingvolernado, bazite sur kelkaj verkoj pri lingvolernado, oni ankaŭ ĝenerale enkondukas la komponantojn de lingvokono, la sukcesan lernanton kaj aliajn atentindajn aferojn dum la lingvolernado. Kelkaj specialaj punktoj pri instruado de Esperanto ankaŭ estas prezentataj. Tiaj strukturoj estas taŭgaj, ĉar la lernado kaj instruado de Esperanto okazas kadre de ĝeneralaj teorioj kaj metodoj pri la lingvoj, tamen, kiel sole funkcia planlingvo, la instruado kaj lernado ankaŭ devas rimarki kelkajn trajtojn de Esperanto nesame al naciaj lingvoj. Fakte, la aŭtoroj de la libro pene sekvas la principojn por trovi la solvon inter ĝeneraleco kaj aparteco de la instruita lingvo — Esperanto.

En la dua ĉapitro *Esperanta didaktiko* Stefan MacGill resumas la demandaron de lingva didaktiko ĝenerala kaj Esperanta. Unu malkompleta listo de la tiklaj (aŭ malfacilaj) punktoj dum instruado de Esperanto estas prezentata: falsaj amikoj, transfero, interfero, prononco, transitiveco de verboj, la difina artikolo “la”, refleksivo, prepozicioj kaj negativoj, lingva kulturismo. Rimarkindas, ke Esperanto estas interkultura (plan)lingvo, tial “estas danĝere kaj limige alproprigi Esperanton ene de la limoj de via propra kulturo kaj lingvo-regiono”. (pĝ. 24).

La tria ĉapitro *Instrumetodoj* enhavas historian trarigardon de la metodoj kaj iomete detale enkondukas kelkajn gravajn instrumetodojn, ekz-e: la gramatika-traduka, la rekta, la aŭda-parola, la situaci-komunika kaj cerbamikaj

metodoj. Esperanto-specifaj metodoj, la Cseh, Zagreba kaj aliaj metodoj, ankaŭ resumitas.

Post mallonga enkonduko de lernomodelo, la aŭtoroj respondas kelkajn interesajn demandojn pri instru- kaj lernomaterialoj, ekz-e: kial cel-lingvaj lerniloj? Kiel trovi taŭgan lernilon? Kiaj lerniloj estonte? La roloj de filmoj, komputilo, reto kaj aliaj helpiloj en la instruado ankaŭ estas diskutitaj. Instruiloj estas gravaj elementoj en instruado, ĉar “bona instruisto por bona laboro uzu saĝe bonajn ilojn”. (pĝ. 68)

En la sesa ĉapitro estas kelkaj ĝeneralaj konsiloj pri lingvo-instruado. Por bona laboro necesas konscie kaj bone preparita plano, kio estas ĉeftemo de la sepa ĉapitro. La celo de lingvo-instruado estas evoluigi lingvajn kapablojn de la lernantoj. Kutime, oni akiras ilin per ekzercoj kaj aktivadoj, kiuj celas praktikadon en certaj kampoj de la instruprocezo. Tial, lingvoekzercoj fariĝas gravaj rimedoj por konstrui la lingvo-kapablojn de la lernantoj. La aŭtoroj tuŝas la temon en la oka ĉapitro per multaj konkretaj ekzemploj.

Kiel taksii la rezultojn de lernantoj? kio estas Eŭropa lingva dokumentujo *Lingva Pasporto*? Tio estas temo de la naŭa ĉapitro. Ĉi tie la ekzamsistemo de UEA kaj ILEI ankaŭ priskribitas. Kiel trovi lernantojn? Kiel organizi kursojn? Kiel instigi al involviĝo kaj plulernado? Kiel pritaksi kurson kun la lernantoj? Se vi bezonas helpojn el instruorganizo, informojn pri ili vi povas trovi en la dekunua ĉapitro.

En la apendico troviĝas kelkaj artikoloj pri verboj en Esperanto, -ig- kaj -iĝ-, situacioj kaj gramatiko, k.a. La aŭtoroj emfazas multfoje la gravecon de la verbo por Esperanto. Tamen verbo gravas ne nur por Esperanto, ankaŭ por aliaj lingvoj. Do, lerni ion el lingvistiko eble ankaŭ utilas al lingvo-instruistoj, kiuj esperas konstrui pli bonan sistemon por efike instrui la uzon de la verbo. La apendico ankaŭ listigas kelkajn specimenojn de kurso-planado pri intensa internacia kurso.

Resume, la libro donas bonan superrigardon pri la metodologio, informas pri praktikaj demandoj, kiuj rilatas al aktualaj kaj modernaj Esperanto-helpiloj. Sendube, la verko tre utilas por ĉiuj instruistoj, kiuj esperas pli efike kaj bone instrui la internacian lingvon.

Liu Haitao



Niaj verkistoj renkontiĝas

Inter verdaj montoj, sub varmaj radioj de la brila suno, okazis la 4a Renkontiĝo de Esperantlingvaj Verkistoj. Kiel kutime la mastrino de la tradicia antaŭ-UK-a aranĝo estis Spomenka Štimec, kaj la loko — ŝia bieneto Njeguš. Aŭspicion donis la Ministerio de kulturo de Respubliko Kroatio.

La renkontiĝo komenciĝis sabate (21 jul) per komuna pikniko, dum kiu manĝante frandaĵojn kaj trinkante bongustan blankvinon sesdeko da partoprenantoj el Kroatio, Pollando, Ruslando, Slovenio kaj Kanado babilis en agrabla etoso.

Post la pikniko Tomasz Chmielik prelegis pri slavaj elementoj en la Esperanta literaturo. Dum sia prelego li prezentis la plej gravajn slavajn verkistojn — de Grabowski kaj Bein tra Miĥalski kaj Varankin ĝis la Praga skolo kun Piĉ kaj Urbanová. Precipante atenton li turmis al la verkaro de Spomenka Štimec, nomante ŝin granda damo de la Esperanto-literaturo.

Post prezentiĝo de Mikaelo Bronŝtejn (Ruslando) kaj de ties verko *Dek tagoj de kapitano Postnikov*, Tomasz Chmielik rakontis pri sia ĵus eldonita traduko de *Mediteranea brevierio* de Predrag Matvejević. Por la fino de la sabata programo Zdravka Metz (Kanado) montris sian laboron enkadre de *Vivprotokoloj*, kiu celas kolekti interesajn historiojn el la “verda” vivo diverslande.

Vespere oni vizitis la belegan preĝejon en Belec, kies baroka internaĵo ravis ĉiujn. Jam en krepusko, ĉe kandelflamoj, Hanna Orlewicz, pola instruistino el Elbląg, gitarludis muzikaĵojn de komponistoj el diversaj landoj kaj epokoj.

Dimanĉe matene (22 jul) Spomenka Štimec rakontis atentokapte pri virinoj en la Esperanta literaturo. Posttagmeze oni ekskursis al Sisak.

Tomasz Chmielik

Kial Volapuko “superis” Esperanton?

Yves Nevelsteen, la redaktoro de la apude recenzita broŝuro, afable konsentis respondi al ni pri la kazo “Volapuko”, menciita de nia recenzanto.

Kial la libera ret-enciklopedio en Volapuko tiel rapide progresis?

YN: La Volapuka Vikipedio antaŭ nelonge subite kreskis de 797 al preskaŭ 112.000 artikoloj, larĝe superante Esperanton kaj aliajn pintajn lingvojn. Per roboto, eta komputila programo, Sergio Meira aŭtomate tradukis centmilon da geografiaj artikoloj de alilingvaj Vikipedioj.

Ĉu ankaŭ esperantistoj uzu ĉi tiun manieron?

YN: Esperantistoj jam sukcese per roboto amaskreis ekzemple 8 mil artikolojn pri italaj urboj en februaro 2006. En la vikipedia diskutejo multaj homoj kontraŭis tion. Ekstis problemoj pri la samnomeco de municipoj kaj ordinaraj Esperanto-vortoj; tia unufoja amaskreado ĉiam kaŭzas multe da kontrollaboro de la kontribuantoj. Laŭ multaj vikipediistoj absolute ne indas havi informojn en enciklopedio “pri ĉiuj etaj vilaĝetoj”.

Mi opinias, ke necesas koncentriĝi je la kvalito de artikoloj kaj je artikoloj kiuj iel rilatas al Esperanto: pri la historio de Esperanto (ekzemple, “Historio de UEA”), pri aŭtoroj kies verkoj estas tradukitaj al Esperanto (ekzemple, Tolkien), kaj pri urboj kiuj ludas gravan rolon por esperantistoj (ekzemple, Białystok).

Yves Nevelsteen

Manlibro praktika kaj utila

Vikipedio: Praktika manlibro / Red. Yves Nevelsteen. — 2a eld. — Parti-zanske: Espero, 2007. — 39 pĝ., il. — 1000 ekz.

La aŭtoroj de la manlibro celas allogi esperantistojn kunlabori en la libera reta enciklopedio, Vikipedio. Tiu celo estas inda, interalie ĉar Vikipedio nun havas signifan influon al “retanoj”, do la esperantlingva parto povas esti unu el iloj por disvastigi la internacian lingvon kaj montri ĝian realan uzon. Sed ankaŭ grave estas konatigi esperantistojn kun libereca koncepto al kiu apartenas licencoj GPL, LGPL, GFDL (laŭ tiu permesilo estas disponigita la manlibro), Creative Commons k.a., kun vikio kaj enkonduki al komuna kunlaboro.

Laŭ la manlibro mem, «Vikipedio ne estas enciklopedio kiel oni komprenas tiun vorton tradicie... Vikipedio ne estas “stato”, ĝi estas “procezo”. Procezo de kunlaboro de ... homoj». Unu enciklopediisto kaj akademiano (aŭ dek) ne estas vera(j) vikipediisto(j) — ĉar por krei vere altkvalitan artikolon ofte necesas multfoja redaktado por korekti erarojn, mistaĵojn kaj aktualiĝi la informon. Do ĉiu esperantisto povas kontribui al la reta enciklopedio.

Bazajn agojn en Vikipedio eblas ĉerpi el la manlibro — kiel oni povas redakti artikolon, krei novan, aldoni ŝablonon, bildon aŭ foton, aldoni kategorion ktp. En la manlibro oni povas trovi multege da ilustraĵoj klarigantaj, paŝon post paŝo, la proceson. Ankaŭ estas facile troveblaj multaj uzindaj konsiloj, kiuj faciligas konatiĝon kun Vikipedio. Tamen estas sufiĉe grave, ke Wikimedia fonduso ankaŭ subtenas kromajn projektojn: Vikivortaro, Vikilibroj (biblioteko de senpagaj lernolibroj), Vikiversitato (liberaj studiloj kaj aktivaĵoj), Vikicitaro, Vikifontoj (senkostaj fontaj dokumentoj), Vikispeccioj, Vikinovaĵoj kaj aliaj.

Kun ĉ. 88 mil artikoloj la Esperanta Vikipedio estas en la 17a loko en la laŭlingva statistiko pri la nombro da artikoloj:

1. Angla 2.003.106
2. Germana 636.891
3. Franca 555.620
- ...
15. Volapuko 111.926
16. Turka 91.161
17. Esperanto 88.617

Aleksej Korĵenkov

Pri la kialo de la sukceso de Volapuko legu ĉi-maldekstre.

Muzik-festa somero en Francio

Muzika kvizo: Flo kaj Aŭtoĵdek (Aleks Kadar)



Jam en julio en la apudpariza SAT-kongreso oni ĝuis kelkajn koncertojn, kiuj antaŭanoncis la aŭgustan FESTOn. Kaj unu monaton poste, inter la 20a kaj 27a de aŭgusto FESTOn gastigis la agrabla urbeto Montoire sur Loir, fama pro sia muzika muzeo kaj pro sia popolmuzika festivalo.

Tuj post la fino de tiu grandega popolmuzika festivalo komenciĝis la Esperanta festivalo FESTO, inaŭgurita per brila parolado de la esperantista vicurbestro. La festivalo disvolviĝis en amika etoso internacia kun partoprenantoj kaj aŭskultantoj el 12 landoj.

Dum la tri unuaj tagoj pluvegis, kaj la ekskursita tago transformiĝis je tuttaga duŝo. Sed la festivalejo estis granda kaj oni povis fari tie diversajn aktivadojn: atelierojn, ludojn, prelegojn, danckursojn kaj, nature, tie sonis muziko dum ĉiuj vesperoj ĝis malfrunokte. Ĉiumatene, kvankam homoj enlitiĝis ege malfrue, okazis danckursoj de la juna rusa knabo Daniil Arbekov (Ĉaĉaĉa) kaj de Julia Bajborodina (ventrodanco).

Ekde la unua vespero ekis prezentaĵoj kun improvizita programo de la interkona vespero.

Marde vespera spektaklo prezentis la francan kantiston Tifen (gitaro kaj kanto) kun tre engaĝitaj acidmordaj kaj humuraj kanzonoj en Esperanto kaj en la franca. Ben ludis akordionon kaj laste Melono per piano ludis ĵazon. Post la koncerto la salono en kelkaj sekundoj tuj transformiĝis je disko-tekto.

Post la merkreda tuttaga duŝo koncertis la febre atendita *Pafklik*. Ili dan-

cigis la homojn per gangstera repo kaj jam antaŭ la koncerto sukcesis arigi fanojn, inter kiuj estis elektitaj kvar knabinoj por koruskanti kun la steluloj en unu kanto.

La *Pafklika* koncerto varmigis la koncertejon por la bando *Nigra Flago* kiu unuafoje koncertis sursceneje antaŭ publiko — la tri junuloj el Liono vigle elĵetis el siaj gitaroj viglan anarkipunkan muzikon... kaj vomaĉis krudajn kantojn, kiuj timigis la knabinetojn. Jen vera konkurenco al la plej fama Esperanta punkbando *Piĉismo!* La nokto finiĝis per punka kaj repa diskoteko.

Ĵaŭde posttagmeze okazis primuzika prelego prezentita de EUROKKA, kaj vespere JoMo kaj *Liberecanoj* etosis kaj dancigis ĉiujn.

Vendrede Kasia kaj Aleks prezentis TEJOn, kaj Tifen prezentis *KoToPon* (ejo en Liono en kiu li laboras). La vizitado de la muzika muzeo devis okazi per du grupoj, ĉar estis tro da dezirantoj.

Vespere, tute surprize, JoMo koncertis kun Kim el *Hotel Desperado*. Ili dancigis la homojn per ŝatataj kantoj kun la gitara kaj akordiona akompano. La salono estis varmega, sed ne nur pro la unua suna tago... Kulpis ankaŭ *Zhou-Mack & la Fabo* alportintaj la varmajn ritmojn el Afriko kaj Jamajko.

Zhou-Mack & la Fabo iĝis la revelacio de la festivalo — vere profesia bando kun bonkvalita muziko... Homoj dancegis dum la tuta duhora koncerto, laŭ regeo kaj miksaĵo de afrika muziko kaj bonega kantado ĝis la dua horo nokte. La publiko ne lasis ilin foriri... ili revenis kanti kvar-foje, kaj fine ili rekantis *Internacian amon*, kiun ĉiuj kunkantis.

La nokto estis tiom varma, ke pluraj homoj, ankaŭ Zhou Mack kaj la *Fabanoj*, iris bani sin al proksima naĝejo.

Zhou-Mack & la Fabo – la revelacio de la festivalo (Fotis Armelle Piolat)



Imagu banadon je la tria horo nokte sub plenstela ĉielo! Post banado multaj restis ĉirkaŭ fajro ĝis la sunleviĝo, gitarludante kaj kantante...

Sabate la tago denove estis suna — trafa etoso por la prelego de Karsten pri alternativa energio kaj por ŝargado de baterioj. Posttagmeze estis malferma prezento al ekstera publiko pri bicikla vojaĝo ĉirkaŭ la mondo.

La sabata vespero estis grava vespero por *Vinilkosmo*, ĉar *Kore* devis prezenti sian novan diskon *Tielas vivo*, sed *Kore* nuligis sian koncerton ĉar la kantisto Kris dum turneo kun alia bando ŝiris siajn voĉkordojn kaj devos ne kanti dum pluraj monatoj... Lastmomente EUROKKA sukcesis trovi alian artiston, kaj *Inicialoj DC* el Frankfurto koncertis vespere post la kantoj de Martin (sen *La Talpoj*, sed kun akustika gitaro). *Inicialoj DC* (unupersona bando) por multaj estis vera surprizo... *Inicialoj DC* utiligas ĉiujn teknikajn rimedojn por sia muziko, gitaron, komputilon kaj videon... tre nova kaj originala maniero muziki kiu alportas ion freŝan.



Bonega FESTO. Jes, la publiko estas laca, sed ja kontenta (Fotis Aleks Kadar)

Dum la tuta FESTO funkciis video-ateliero por fari muzikfilmeton ... por tio estis elektita muziko de la disko *Pli ol nenio* de Martin kaj *La Talpoj*, kaj la dimanĉan matenon eblis vidi la provon. Kiam la filmo estos finmuntita vi povos spekti ĝin ĉe <http://farbskatol.net/>

La lasta tago... Ĝin kronis la internacia vespero — bonkvalita kaj tre varia kun multaj artistoj diversspecaj. Kaj dum la finfina karaokeo teknikistoj (Melono kaj Flo) ekmalpulis la materialon (lumoj kaj sono). Ĉio finiĝis je la 4a matene.

Kia bonega FESTO! Laciga sed elstara! Certe ni revenos!

Somerfestumis por vi **Flo!**



La kvara libro pri Maigret en Esperanto

Fine de aŭgusto la kaliningrada eldonejo *Sezonoj* aperigis la libron *La flava hundo* de Georges Simenon. Ĝi estas la kvara libro pri komisaro Maigret en Esperanto post *Maigret hezitas* (1999), *Maigret kaj la maljuna damo* (2002) kaj *Amiko el la junaĝo de Maigret* (2004). Ĉiuj kvar libroj estas tradukitaj de franca esperantisto Daniel Luez.

La flava hundo estas unu el la fruaj romanoj pri Maigret. Ĝi estis eldonita en 1931, kaj sekvajare ĝia filmoversio kun Abel Tarride en la rolo de Maigret, estis spektebla en kinejoj (aliaj filmaj versioj diverslingvaj aperis poste). La eventoj disvolviĝas en havenurbo Concarneau, kie ĝis nun funkcias la restoracio *Admiralo* (L'Amiral) en kiu la intrigo komenciĝas.

Ĉar kelkaj realaĵoj en la romano eble ne estas facile kompreneblaj por nuntempuloj, precipe por nefrancoj, ili estas klarigitaj en *Notoj*. Estas aldonita ankaŭ proksimuma prononco de kelkaj francaj nomoj, renkontataj en la romano. La libro estas presita en Kaŭno (Litovio). La kovrilon faris Larisa Jakovleva.

La flava hundo aperis kiel la 14a volumo en la libroserio *Mondliteraturo*, en kiu venont-jare aperos novelaro *La sekreta miraklo* de Jorge Luis Borges, romano *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj* de Jules Verne, kaj novelo *La hunda koro* de Miĥail Bulgakov.

La flava hundo estas mendebila kontraŭ 12 eŭroj ĉe pluraj Esperantaj libroservoj. La abonantoj de *La Ondo* povas mendi ĝin rekte ĉe la redakcia adreso je favoraj kondiĉoj.

Agrablan legadon!

HaGo

Ricevitaj libroj

Gdańsk: [Gvidlibro]. — Gdańsk: Departemento de Promocio de la Urbo. — 32 pĝ., il. — [EEK-18].

Goes, Heidi. *Afero de espero*: Konciza historio de la Esperanto-Movado en Afriko / Enkond. Renato Corsetti. — Rotterdam: UEA, 2007. — 86 pĝ., il. — [Recenzoekzemplero].

Kongresa informilo: 18a Ekumena Esperanto-Kongreso. 21–18 jul 2007, Pelplin / Red. Jadwiga Wasiuk; Trad. el la pola Edward Kozyra. — Pelplin: [LKK], 2007. — 27 pĝ., il. — [EEK-18].

Kozyra, Edward. *Vortaro Esperanto-angla-pola*. — Malbork: Wo-To, 2007. — 160 pĝ. — [Donaco de Edward Kozyra].

Manlibro pri instruado de Esperanto / Red. Katalin Kováts. — Represo de la 2a eld., kor. — Hago: ILEI; Partizánske: Espero, 2006. — 152 pĝ., il.; 300 ekz. — [Recenzoekzemplero].

Rutkauskas, Romualdas. *“Ruto” levis esperon*: En la litova kaj en Esperanto. — Šiauliai: Eskpresyvus kontaktas, 2007. — 160 pĝ., il.; 800 ekz. — [Donaco de LitEA].

Sankta Meso: La 15-a ordinara dimanĉo. — [Kaunas]: Litova Esperanto-Asocio, 2007. — 18 pĝ. — [BET-43].

Šiauliai: Turisma gvidilo / Trad. el la litova Zenonas Sabalys. — Klaipėda: Druka, 2007. — 63 pĝ., il.; 500 ekz. — [BET-43].

Tekstoj de litovaj kantoj / Trad. el la litova Petras Čeliauskas. — [Kaunas]: [Litova Esperanto-Asocio], [2007]. — 8 pĝ. — [BET-43].

Vikipedio: Praktika manlibro / Red. Yves Nevelsteen. — 2a eld. — Partizánske: Espero, 2007. — 39 pĝ., il.; 1000 ekz. — [Recenzoekzemplero].

Ricevitaj gazetoj

Esperanta Finnlando. 2007/4; Esperanto USA. 2007/1-2; Esperanto en Danio. 2007/3; Esperanto sub la Suda Kruco. 2007/5; Ĝenerala Informilo. 2007/144; Internaciisto. 2007/5; La KancerKliniko. 2007/123; La Movado. 2007/678,679; La Ondo de Esperanto. 2007/8-9; La Revuo Orienta. 2007/7,8-9; Le Monde de l'Espéranto. 2007/562-563; Mikrofone. 2007/2; Okazas. 2007/562-563; Pola Esperantisto. 2007/4; Svisa Esperanto-Societo Informas. 2007/3; Zagreba Esperantisto. 2007/3.

Nia gazetaro sub lupeo

La broŝuro *Ankoraŭfoje pri la Esperanta gazetaro* de Aleksander Korjenkov, aperinta ĉi-somere en la serio *Sed ne el katedro* enhavas, interalie, tabelon pri la eldon- kaj abon- kvantoj. La tabelo ne apartigas sendependajn gazetojn disde membro-gazetoj. Sed, ekzemple, inter 4089 abonantoj de *Esperanto* estas nur 174 abonantoj, kaj preskaŭ kvar mil diverskategoriaj membroj de UEA.

Internaciaj gazetoj

Titolo	Eldon- kvanto	Abon- kvanto
Esperanto	5500	4089
Monato	1900	1700
Heroldo de Esperanto	1100	1000
Kontakto	1100	893
Sennaciulo	1000	850
Literatura Foiro	850	750
Juna Amiko	1100	700
Espero Katolika	1000	675
TEJO-Tutmonde	800	626
Int. Pedagogia Revuo	800	596
La Ondo de Esperanto	700	545
La Kancerkliniko	300	?
Femina	500	200
Naturista Vivo	90	90

Landaj gazetoj

Titolo	Eldon- kvanto	Abon- kvanto
La Revuo Orienta (JP)	1800	1315
Esperanto aktuell (DE)	1400	1000
L'esperanto (IT)	?	950
La Lanterno Azia (KR)	1000	835
Le Monde de l'Eo (FR)	1000	700
Starto (CZ)	670	600
La Espero (SE)	?	550
Horizontaal (BE)	600	400
Tempo (HR)	550	352
Esperanta Finnlando	400	350
Bulgara Esperantisto	320	300
Pola Esperantisto	300	280
Litova Stelo	600	245
REGo (RU)	250	210


La redakcioj (redaktoroj) de aliaj gazetoj ne respondis.

Por la julia krucvortenigmo venis 16 respondoj, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis: Andrej Kirienko (Belarusio), Edmund Grimley-Evans, Malcolm Jones (Britio), Erkki Kemppainen, Bruno Lehtinen (Finnlando), Francesc Serra (Hispanio), Hans-Burkhard Dietterle (Germanio), Howard Gravatt (Nov-Zelando), Maria Boharewicz, Dorota Burcharadt, Mirosława Kubicka, Hanna Skalska, Zbigniew Tylkowski (Pollando), Klara Ilutovič, Svetlana Konjašova, Nikolaj Penčukov (Ruslando).

Loto donis libropremion al **Andrej Kirienko**. Ni gratulas lin!

La ĝustaj respondoj: **Horizontale** 1. Nederland’; 5. Aŭstri’; 6. Asisti; 9. Pere’; 10. Kolibro; 11. Rism’; 15. Ankar’; 16. Monat’; 18. Alial; 19. Svedi’; 20. Astak’; 24. Dekan’; 25. Tilio; 26. Arane’; 27. Metr’; 28. Parnaso; 31. Rano; 34. Regatt’; 35. Tereno; 36. Tungsteno. **Vertikale** 1. Naso; 2. Dorno; 3. Anser’; 4. Dism’; 5. Afriko; 7. Ilicio; 8. Hieno; 9. Prazeodim’; 12. Molibdeno; 13. Provinc’; 14. Karavan’; 16. Medit’; 17. Testo; 21. Ekster’; 22. Plong’; 23. Ŝakalo; 29. Anten’; 30. Stele’; 32. Agat’; 33. Peso.

Ora skvamo



Horizontale: 5. Loĝanto de Apenina duoninsulo. 7. Flueca, flua (R). 8. Kemia elemento Re (R). 9. = Agresiva (R). 12. Maljuna. 15. Genro de papagoj (R). 17. Lando de la 37a UK (R). 18. Fajre varma, entuziasmega. 19. Ĉio, kio ĉirkaŭas nin (R). 20. Parto de mekaniko. 21. Farbo. 23. Kemia elemento Zn (R). 25 = Citronarbo (R). 28. Kampo, sur kiu kreskas kulturplantoj. 29. Delfeno. 30. Monunuoj de Serbio, Irako k.a. (R).

Vertikale: 1. = Maldekstra. 2. Hejma besto (R). Alfabeto, kies “literoj” konsistas el punktoj kaj strekoj (R). 4. Elektрона valvo (R). 6. Gazeto “La ... de Esperanto”. 10. Lando de la 70a UK (R). 11. = Pensiulo. 13. Pingloarbo (R). 14. Korta birdo. 15 = Ŝlimbirdo (R). 16. Inerta gaso (R). 22. Ĉefurbo de Latvio. 24. Ĝi estas uzata por skribi, presi aŭ desegni. 25. Mezuro de pezo. 26. = Maldika (R). 27. Parto de horizonto (R).

La solvoj venu al la redakcio rete aŭ poŝte antaŭ 15 nov.

Kompilis **Viktor Alikin**

SPRITAJ SPLITOJ KAJ PRESKERAROJ el la kolekto de reduktoro

Corsetti: Ne prediku al zombioj

Nia vera celo estas konvinki la homojn, la vivantajn homojn, pri la boneco de nia solvo kaj instigi ilin lerni Esperanton. (*Renato Corsetti aktivos loke kaj fake*, 3 sep 2007, <http://www.liberafolio.org/2007/renatopluaktivos>)

Neceje kaj suface

BV informi pri neceja dokumentoj ktp (Alicja L kaj Bozidar Leonov, 25 aŭg 2007, <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/3404>)

Instrui kun siapeca spico

Asocion oni ankaŭ bezonas por ... organigita instruado, por klerigado de instruistoj, por scienca laboro ... ktp. (Tra-rigardo de la Esperanto-Gazetaro, 22 maj 2007, <http://www.polskieradio.pl/eo/dokument.aspx?iid=52829>)

Zorgojn oni zorge kreas

Se la kongreso sukcesas, la asocio daŭre konas zorgojn. (HeKo 338 4-A, 8 sep 2007)

Mil jaroj da propedeŭtiko

Mia eksperimento en jaroj 1003-1995 en Slovenio kaj Aŭstrio kaj Kroatio estis farita laŭ la metodo de Paderborn. (Zlatko Tišljar, <http://groups.google.com/group/lingvolanĉilo>, 22 jul 2007)

Kompromita predik(t)o

La ubuntu teamo publike kompromitas sin kun la uzantoj... Ubuntu estas regulare kaj predikteble liberigata: nova finversio aperas ĉiun jaruonon. (<http://wiki.ubuntu.com/EsperantoDocumentation>)

Hipertestu la Ĝeneralan Regularon

1.4 La Esperanta testo de la regularoj de UEA estas la teksto definitiva. (http://www.uea.org/dokumentoj/ghenerala_regularo.html)

Studu minimume, atingu rekordon

600 studetoj en universitata kurso! Universitato Shenyang starigas novan rekordon. (*Ret-info*, 14 apr 2007)

Plukis **István Ertl**

Sergej Potoskujev partoprenis, kun sia edzino Lidija, la Someran Festivalon en Barlastono (pĝ. 8).

Dum la lecionoj kaj prelegoj li sukcesis trovi tempon por fari kroki-zojn de kelkaj partoprenantoj: Paul Gubbins (supre); Jack Warren, David Kelso, William Walker (sube, de maldekstre).



Anoncetoj

Pere de *La Ondo de Esperanto*, en la nomo de la partoprenantoj de la 18a Ekumena Esperanto-Kongreso, kiu okazis 21–28 jul 2007 en Pelplino, ni deziras esprimi vortojn de aprobo al Halina Gorecka, kaj ni dankas al Halina pro ŝia alveno kun sia filo Aleksej al Pelplino. La partoprenantoj de la 18a EEK esprimis grandegan ĝojon, ke Halina pli bone fartas. Halina, ni estas kun Vi!!!

Partoprenantoj de la 18a EEK

Post la unuaj provoj de neoficiala kunlaboro inter VV, PEJ, SKEJ, EkMASI, IEJ, FLEJA kaj KEJ, ĉi-jare dum la Ago-Semajno (Malbork, Novjarfesto 2008) ni evoluigis ideon starigi internacian teamon pri organizado de la junularaj aranĝoj kaj renkontiĝoj.

Temas pri teoria kaj praktika trejnado ĉe diversnivela organizaj aferoj, aliĝo al la taskoj de la LKK surloke, fine fondo de la internacia grupo, kies tasko estos krei skizon de kunlaboro, apogi kaj kune organizi renkontiĝojn kaj aranĝojn elektotajn por la venonta jaro. Se ni ne zorgos pri ni mem neniu pri ni zorgos.

Por ĉion organizi surloke, mi petas ĉiujn interesiĝantojn aliĝi al la teamo: viavento@poczta.onet.pl

Irek Bobrzak

La Loko ĉesigas sian agadon. Ni decidis fini nian kunlaboradon. Ni daŭrigos niajn artajn praktikadojn individue. Ni ŝatus danki ĉiujn, kiuj subtenis nin dum la lastaj kvar jaroj.

Olof & Daniel

Ni sendas gratulojn al

Alida Kaplick (Esperanto-instruistino) kaj Michael Zilvar (denaskulo) okaze de la naskiĝo de ilia filino Sophie Kaplick 13 jul en Leipzig!

Viktoras Baniulaitis, aktivulo el Klaipėda, organizinto de kelkaj BET-oj, multjara reprezentanto de SAT en Sovetunio kaj Litovio, kiu 4 aŭg 2007 fariĝis 90-jara!

Stasys Gaidamavičius, aktivulo de la sovetunia kaj de la litovia Esperanto-movadoj, aŭtoro de *Litovaj-Esperantaj Konversacioj*, redaktinto de la samizdata bulteno *Kurte*, kiu sesdekjariĝis 10 sep 2007!

LOdE

Oceania Kongreso en Nov-Zelando

14-23 januaro 2008

Oceania Kongreso okazos en Auckland,
la plej granda urbo de Nov-Zelando
Trankvila kongresejo inter la urbocentro
kaj internacia flughaveno

*Kongresa programo plena je ekskursoj, debatoj,
distraĵoj kaj kursoj kun internaciaj instruistoj:*

Stano Marček, redaktoro de Esperanto

Trevor kaj Katja Steele (Aŭstralio)

Kongresa kotizo ekde nur 425 eŭroj por 9-taga kongreso: surloka loĝado, ĉiuj manĝoj, partopreno en kongreso kaj kursoj

Por pliaj informoj: www.esperanto.org.nz

*Ni bonvenigas samideanojn el la tuta mondo
al nia varm-somera kongreso*



Pollando. La 41a Internacia Esperanto-Feriado okazis 18–26 aŭg 2007 en Szczawno Zdrój kun 40 esperantistoj el Britio, Usono, Germanio, Italio kaj Pollando. Lingvokursojn gvidis Roman Dobrzyński, Teresa Nemere kaj Grzegorz Pisarski. La programon kompletigis prelegoj, ekskursoj kaj vesperaj kantadoj kaj dancadoj. (Andrzej Sochacki)



Slovakio. La unua Slava Esperanto-Studado (vd. pĝ. 9) ebligis konatiĝi per Esperanto kun kulturoj kaj tradicioj de slavaj popoloj per kursoj, prelegoj, filmoj, ekskursoj kaj per spektakla kaj koncerta programoj. (Peter Balaž)



Serbio. 26 jul, je la 120-jariĝo de Esperanto, fervojista Esperanto-societo “Mile Veličković” en Niš (Serbio) lanĉis Someran Esperanto-Lernejon kaj pendigis afiŝon pri Esperanto en la ĉefa urba promenstrato. La urba komunumo donis al la societo rajton senpage lasi la superstratan afiŝon dum dek tagoj. (Zoran Ĉiriĉ)



Post naŭ sukcesaj konkursoj (1998–2006) la redakcio de *La Ondo de Esperanto* invitas al partopreno en la deka Internacia Fotokonkurso. Rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15×20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La fotoj devos atingi la sekretarion de la konkurso antaŭ la 1a de decembro 2007.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas) de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

Juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1. 50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2008.
2. 25 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2008.
3. abono de *La Ondo de Esperanto* en 2008.

Speciala premio (50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto*) por la plej bona foto pri la temo *Festoj*.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita en *La Ondo de Esperanto*. La organizanto de la konkurso havos ĝis la 31a de decembro 2009 ekskluzivan rajton uzi la ricevitaĵajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj. Poste la publikigo-rajton havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj.

Pro “Manoj kun kafo” Marcos A. Bueno estis laŭde menciita en 2003.